

1976 septembro

69-a jaro


n-ro 849 (9)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Vi trovos

la kutiman klarigon, kiu apartenas al ĉi tiu rubriko de la revuo, ĉi-foje sur la paĝo 153, sub la titolo "Hasto kaj kosto". Ĉi tiujn liniojn ni rezervis ĉefe por listigi la personojn, kiuj kun granda sindonemo helpis, ke la ĉi-jara kongresa numero de la revuo atingu vin sen grandaj prokrastoj. Antaŭ ĉio temas pri la konata nomo de Vilmos Benczik, kiu konsentis veni al Ateno kaj efike funkcii kiel helpa redaktoro de ĉi tiu numero, kio siavice ebligis al la redaktoro mem helpi en la organizaj kongreslaboroj. Krome, la tuta juna teamo, kiu unuafoje klopodis plenumi la komplikan taskon de la Kongresa Gazetara Servo, — Guido Brandenburg, Paul Peeraerts, Giulio Cappa kaj iome la iom pli aĝa Franko Luin — liveris amason da faktoj kaj utilaj notoj por ĉi tiu numero. Ni aŭdacas danki al la menciitaj kunlaborantoj ne nur nome de la redakcio, sed ankaŭ nome de la tuta legantaro de nia revuo.

Enhavo

- 137 Kuraĝa kongreso en Ateno
- 138 La Solena Inaŭguro: La juna kulturo salutas la antikvan, Mesaĝo de la ĝenerala direktoro de Unesko: M'Bow: Mi forte esperas, ke tiuj rilatoj plifortiĝos
- 139 Kongresa rezolucio II
- 140 Festprelego de d-ro Werner Bormann: La konvencia vojo — sakstrato
- 141 Kongresa rezolucio I
- 142 La malferma solenaĵo de la Kongreso: Ne nur pri pretendoj, sed ankaŭ pri sukcesoj (H.R. Tonkin), Salutoj de ĉiuj mondpartoj
- 145 Komitataj kaj estraraj kunsidoj: Efikeco de la Komitato (S. Milojević)
- 146 Kongresa rezolucio III
- 147 Laborkunsidoj: Unua ĝenerala kunsido, Dua ĝenerala kunsido, Solena Fermo: Pokalo al Svedio
- 148 Raporto pri la Belartaj Konkursoj 1976: Evento: La unua premio por prozo aljuĝita! (Baldur Ragnarsson)
- 149 Sola en sunsubiro (Eduard Tvarožek)
- 150 La manoj de l' homo (Vesna Skaljer-Race)
- 151 Teatra vespero: Kial ne grekaĵo? (Vilmos Benczik), Potenca bulgara koruso
- 152 Greka vespero: Perfekteco kiel manko, Internacia Arta Vespero: William Auld k.a.
- 153 Hasto kaj kosto, Internacia Somera Universitato: Plia kontribuo al la faka literaturo
- 154 La 32-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO: Tesaloniko: Unu el la plej grandaj IJK (V. Benczik)
- 155 TEJO en Ateno, "Por ke vi sciu . . ."
- 156 Kongreseroj . . .

La kovrilo

Por la kovrila foto de la numero, kiu raportas pri la Kongreso pere de kiu "La juna kulturo de la Internacia Lingvo salutas la antikvan kulturon de la grekoj", ni elektis junan japanan kongresaninon, kiu pozas antaŭ unu el la belegaj tri kongresaj afiŝoj, kiuj dum la Kongreso ornamis preskaŭ ĉiun angulon de la greka ĉefurbo. Kvankam la kovrilprojekto venas el la kutima "redakcia kuirejo", la foton mem ni ŝuldas al la nederlanda ĵurnalisto Ad Coerant, kiu laboras en Ateno. Al li ni ŝuldas ankaŭ plurajn aliajn fotojn en ĉi tiu numero. Tamen, kaj — ne miru pro tio — kelkajn fotojn por la numero afable disponigis al ni la redaktoro de "Heroldo", s-ino A. Fighiera-Sikorska.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: Simo Milojević.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 37,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 19,25; Sud-Ameriko 16,50; Suda Afriko, Azio 13,75; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 11,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265 gld., 1/4p. 145 gld., 1/8p. 85 gld., 1/16p. 55 gld. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro Humphrey R. Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; telefono: (215) CL9 - 8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FRG; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de la agado de UEA: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; tel. (072) 16725.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, Poŝtfako 901, PL-30-960 Krakow 1, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (085) 137412.



La ĉefurbo de Greklando malavare gastigis la 61an UK: Reprezentantoj de la Kongreso ĉe la ĉefurbestro Papateodoru.

Kuraĝa kongreso en Ateno

FARANTE LA DECIDON okazigi la 61an Universalan Kongreson de Esperanto en Ateno, la Estraro de UEA tiam (en januaro 1975) plene konsciis, ke ĝi entreprenas paŝon kuraĝan, riskan, preskaŭ aventuran. La loka Movado ne estis matura por transpreni tiel gigantan laboron kia estas la organizo de UK. Sed, la Estraro bone sciis, ke okazigo de la Kongreso povus multoble rapidigi la maturiĝon kaj multiĝon de la greka esperantistaro. Cetere, oni ŝuldis kongreson al la lando, kiu jam komence de la jarcento havis relative fortan Movadon, al la lando, kiu jam en 1910 sur la teritorio de unu el siaj insuloj (Samos) devige instruis la Internacian Lingvon al 1740 gelernantoj en 31 lernejoj. Kongreson oni ŝuldis ankaŭ al la unika lingva teritorio, kiu pro siaj propraj identeco kaj aparteco plene konscias pri la lingva problemoj kaj ĝia aktualeco.

Estis malfacile prepari la Kongreson en Ateno, malgraŭ la tuta bonvolo kaj sindonemo de la Loka Kongresa Komitato. Feliĉe, Universala Kongreso malofte ĝuis tiel sinceran apogon de la ŝtataj kaj urbaj aŭtoritatoj, kiel tio okazis kun la 61a UK en Ateno. Ne temas nur pri akceptoj kaj regaloj, sed antaŭ ĉio pri tiel efika kaj efektiva materia asisto kien al la Kongreso donis ekz. la Nacia Turisma Oficejo de Greklando, la nacia flugkompanio Olimpika kaj la Ministerio pri Civilizo, i.a. per senpaga disponigo de la kongresejo. Greklando efektive gastigis la Kongreson.

Kiam baldaŭ finiĝos traktado kun la Bulgara Esperantista Asocio, kiu peris grupan aliĝon al la Kongreso de pli ol 280 kongresanoj el tiu lando, la fina nombro de aliĝintoj al la 61a UK estos ĉ. 1350 kongresanoj el 51 landoj. Tio ne vicigos la 61an inter la plej multnombrajn UK, sed jes inter la plej grandajn internaciajn kongresojn okazintajn en la greka ĉefurbo, kiu tre malfacile gastigus pli ampleksan renkontiĝon samspecan. Ekzistas alia afero, kiu vicigas la atenan Kongreson inter la aparte notindajn: ĝi estis unu el la plej vasteĥaj UK rilate la naciajn radion, televidon kaj gazetaron. Kaj, ĝuste tio estas unu el la ĉefaj pravigoj por la entreprenita kuraĝo okazigi la Kongreson tie. Nun la Internacia Lingvo fariĝis kaj daŭre fariĝos "ordinara" temo de la grekaj amaskomunikiloj. Tio estas unu el la ĉefaj rezultoj de la 61a UK.

Tre sinceran dankon pro la bona evoluo de la Kongreso meritas la kongresanaro. Estante la ĉefa kaj fina juĝanto, ĝi ne nur komprenis delikatajn problemojn, kiujn la organizantoj devis solvi, sed ankaŭ pruviĝis esti — ne dorlotita turismema homamaso, kiu unuavice celas bone kaj komforte libertempi, sed male — engaĝita, konscia reprezentanto de batalanta internacia organizaĵo, solidareca internacia kolektivo, interesita pri la plua evoluigo de la tutmonda Esperanto-movado. Do, venontjare premiero en Islando, poste eble en Brazilo, Madagaskaro,...

La juna kulturo salutas la antikvan

"NI KONGRESAS la unuan fojon en Ateno. Ni kongresas la unuan fojon en Grekujo. La juna kulturo de la Internacia Lingvo salutas la antikvan kulturon de la grekoj. En la stratoj kie promenis Sokrato, Platono, Eshilo, Sofoklo, Aristofano, aŭdiĝas la Internacia Lingvo Esperanto." Tio estis la unuaj vortoj de la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey R. Tonkin, en la impona festsalono de la atena Hotelo Hilton, ĉe la komenciĝo de la Solena Inaŭguro de la 61a Universala Kongreso de Esperanto, dimanĉon, la 1-an de aŭgusto 1976, je la 10a horo matene. En la ĉeesto de pli ol 1200 kongresanoj el kvindeko da landoj de ĉiuj mondpartoj, la prezidanto aparte salutis la ĉeestantajn reprezentantojn de la grekaj registaro kaj ĉefurbo: s-ron Panajotopulos, vicministron pri komerco kaj reprezentanton de la registaro, s-ron Zorojanidis, direktoron en la Ministerio de civilizo, kiu estis persona anstataŭanto de la Alta protektanto prof. Tripanis, ministro pri kulturo kaj sciencoj, kaj s-ron Papateodoru, la ĉefurbestron de Ateno. Post bonvenigaj vortoj de s-ro Miggas, prezidanto de LKK, d-ro Tonkin prezentis la ĉeestantojn sur

S-ro Panajotopulos, kies salutvortoj sekvis, i.a. diris: "Greklando, kune kun ĉiuj pacaj landoj, kredas kaj fidas, ke granda klopodo faciligi la komunikadon kaj interkomprenon inter la popoloj estas la sindono al unu komuna lingvo, kiu nuligas la antagonismojn kaj kondukas al la realiĝo de tiu daŭra paco, kiun serĉas la tuta mondo." Tre varman akcepton renkontis ankaŭ la vortoj de la atena ĉefurbestro, s-ro Papateodoru, kiu kun grandega simpatio rilatis al la Kongreso jam dum ĝiaj preparlaboroj al kiuj li donis malavaran subtenon. Sekvis la vicprezidanto de UEA, d-ro Werner Bormann, kun sia prezento de la kongresa ĉeftemo; tiun tekston vi trovas aliloke en ĉi tiu numero de la revuo.

D-ro Tonkin voĉlegis kelkajn el la skribaj mesaĝoj al la Kongreso, i.a. la mesaĝon de la ĝenerala direktoro de Unesko (v. aliloke en ĉi tiu numero) kaj leteron de la Eŭropa Komunumaro, kiun en la Solena inaŭguro kaj

MESAĜO DE LA ĜENERALA DIREKTORO DE UNESKO:

M'Bow: Mi forte esperas, ke tiuj rilatoj plifortiĝos

Okaze de la 61a Universala Kongreso de Esperanto, estas por mi plezuro saluti en la nomo de Unesko Universalan Esperanto-Asocion kaj la partoprenantojn de la Kongreso.

Kiel interŝtata organizaĵo kun 136 suverenaj ŝtatoj-membroj, Unesko plene konscias pri la problemoj de komunikado kaj interkompreniĝo, kiujn kaŭzas la multeco de la lingvoj uzataj tra la mondo, kaj konscias same pri la kultura riĉo, kiun ili prezentas.

La grandaj celoj de Universala Esperanto-Asocio rilate la faciligon de internaciaj intelektaj interŝanĝoj por pli bona kompreno inter la popoloj respondas al tiuj de Unesko. Estis do nature, ke establiĝu inter la du organizaĵoj amikaj rilatoj, kiujn confirmis formala interkonsento, kiu starigis konsultajn kaj informajn rilatojn. Mi forte esperas, ke tiuj rilatoj plue plifortiĝos en la venontaj jaroj.

La temoj, kiujn pritraktos ĉi tiu 61a Universala Kongreso — ĉu tiu de la internacia kunlaboro je regiona nivelo, de regionaj grupiĝoj en la kadro de internaciaj organizaĵoj, de la lingva situacio en tiuj institucioj aŭ tiu de la rolo de lingvoj en evoluigo — ĉiuj tuŝas kampojn tre gravajn por Unesko.

Tial, atendante kun la plej granda interesiĝo la rezultojn de ĝiaj diskutoj, mi prezentas sincerajn bondezirojn por la disvolviĝo de la kongresaj laboroj.

Amadou-Mahtar M'Bow

D-ro Schmidt, konsilanto de la Ambasadro de FR Germanio, salutas la Kongreson; interpretas s-ro U.J. Moritz.

la solena podio, kie, krom la Kongresa prezidantaro (Tonkin, Bormann, Stöp-Bowitz, Wensing, Manus, Peevski, Miggas), sidis ankaŭ la reprezentanto de la greka registaro kaj la urbestro (kun siaj interpretistoj), la ceteraj membroj de la Estraro de UEA kaj la direktoro de la CO.

en kelkaj aliaj kongresaj eventoj reprezentis s-ro Pignot, estro de la traduka servo de EEK en Bruselo. Estas menciinde, ke al la Kongreso adresis leterojn ankaŭ: Organizaĵo de Afrika Unueco, Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj, Eŭropa Parlamento (ĝi eĉ anoncis reprezentigon, kiu tamen ne realiĝis), la Monda Organizo pri Sano, Ligo de Arabaj Ŝtatoj (ankaŭ ĝi anoncis reprezentigon) kaj pluraj aliaj internaciaj kaj interŝtataj organizaĵoj kaj institucioj. Necesas substreki, ke en la Inaŭguro reprezentigis ankaŭ la Informa Centro de UN por Greklando, Israelo kaj Kipro.

Sekvis la salutoj de la diplomatiaj reprezentantoj: aferŝarĝito de la bulgara ambasado, konsilanto de la ambasado de FR Germanio, kiu legis telegramon de la

anto-Muzeo, Malta Esperanto-Societo kaj Asocio Internacia por Defendo de la Minacataj Lingvoj kaj Kulturoj. Varman aplaŭdon renkontis ankaŭ la letero, kiun la prezidanto de Sennacieca Asocio Tutmonda direktis al la 61a UK.

La Solena Inaŭguro finiĝis per kelkaj vortoj de la prezidanto de UEA, direktitaj ĉefe al la plurdeko da ĉeestantaj gastoj. D-ro Tonkin i.a. diris: "Ni estas por lernado de fremdaj lingvoj. Sed la rezulto preskaŭ ĉiam estas, ke la lerninto parolas neplenan lingvon, balbutas, estas parole kripla. Por internacia uzado, pro siaj facileco kaj flekseblo, Esperanto estas pli natura, ol ĉia lernado de fremdaj lingvoj, pli plena ol ĉiuj aliaj rimedoj de interkontaktigo inter la homoj."

Tute maldekstre: D-ro Tonkin kun s-ro Linaras, direktoro de la Ministerio pri civilizo, homo kiu patronece rilatis al la Kongreso ekde la unuaj klopodoj organizi ĝin en Ateno.. Maldekstre: S-ro Papateodoru, la ĉefurbestro, salutas en la Inaŭguro. Sube: Kongresanoj dum la inaŭgura solenaĵo.



germana ministro pri eksteraj aferoj Genscher; ankaŭ konsilanto de la israela ambasado unue legis telegramon de sia ŝtatprezidanto Ephraim Katzir kaj poste parolis en Esperanto; parolis ankaŭ konsilanto de la japana ambasado kaj aferŝarĝito de Meksikio; du eminentaj esperantistoj portis al la Kongreso salutojn de siaj registaroj: kapitano R. Bugge-Paulsen parolis en la nomo de la norvega registaro kaj informis, ke en tiu lando baldaŭ komencos aperadi informmaterialoj en la Internacia Lingvo; el la venontjara kongreslando Baldur Ragnarsson portis salutojn de la islanda ministro pri kulturo. En la Inaŭguro ĉeestis (sed ne parolis) ankaŭ: sekretario de la belga ambasado, konsulo de Germana DR, vicdirektorino de la Itala Instituto en Ateno, unua sekretario de la pola ambasado kaj kultur-ataŝeo de la Ambasado de Usono. Krom la 13 registaroj (inkluzive Greklandon), kiuj sendis siajn reprezentantojn al la Inaŭguro, Finnlando sendis saluttelegramon pere de sia Ambasado, kaj la ĉefministro de Nov-Zelando adresis al la Kongreso apartan leteron.

El multaj salutleteroj kaj telegramoj, venintaj ankaŭ el Afriko kaj Sud-Ameriko, ni menciuj tiujn de la antaŭa vicprezidanto de UEA Erik Carlén, Internacia Esper-

KONGRESA REZOLUCIO 2

La 61a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Ateno, Grekujo, de la 31a de julio ĝis la 7a de aŭgusto 1976, notas, ke la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj pri Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko) festos la 4an de novembro 1976 la 30an datrevenon de sia fondiĝo.

Gratulante al Unesko je tiu okazo, la Kongreso rimarkas kun danko kaj atento la gravan laboron faritan de Unesko dum tiu periodo, kaj deziras al ĝi daŭran sukceson en la antaŭenigo de la edukado, scienco kaj kulturo je tutmonda skalo.

La konvencia vojo – sakstrato

EN SIA NUNJARA Universala Kongreso la internacia Esperanto-movado ekstraktas laborkampon, kies graveco en la monda politiko lastatempe plene evidentiĝis: la internacia kunlaborado de ŝtatoj je regiona nivelo. Internacia organizaĵo kiel UEA kompreneble ĉiam sentas apartan ligitecon al mondvastaj organizaĵoj. Tial ni tiel forte kunlaboris kun Unesko jam dum longa periodo. Sed ankaŭ ni fervoraj apogantoj de unueca mondo, kies lingvon ni jam posedas, ne povas resti ekster la monda fakta evoluo. Kun vera malĝojo ni konstatas la grandajn problemojn de tutmondaj organizaĵoj en la hodiaŭaj cirkonstancoj. Evidente, malsamecoj en la vivkonceptoj de la multaj popoloj sur la tero estas ankoraŭ tiom grandaj, ke la heterogeneco bremsas la alproksimiĝon al mondvasta unueco.

Alie statas la ŝancoj, se unuigaj klopodoj okazas en limigitaj partoj de la mondo, kie najbaraj ŝtatoj en similaj evoluoj dum jarcentoj aŭ sub forta influo de komuna idea fundamento jam akiris iun gradon de homogeneco. Regionaj aliancoj ĉiam ekzistis. Tio jam komenciĝis en antikvaj tempoj, kaj en la klasika Grekujo kunagantaj urboj uzis la komungrekan lingvon "koine". Ankaŭ en tiu rilato Grekujo prenis pioniran pozicion.

Nuntempe internacia kunlaborado de ŝtatoj je regiona nivelo ekzistas multloke. Tiucelaj organizaĵoj kunigas en si parte eĉ tutajn kontinentojn. Ili prezentigas en du diversaj formoj. La plej granda parto laboras laŭ malnova kutimo per konferencoj por interkonsiliĝado kun nur malgranda oficejo, sed kelkaj estas ankaŭ tre striktaj formoj de unuiĝoj. Kiel ekzemploj por la kutima kunlaborado de ŝtatoj je regiona nivelo menciindas la Organizaĵo de Afrika Unueco, la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj, la (okcident-) Eŭropa Konsilantaro. Ili aplikas same kiel Unuiĝintaj Nacioj traduksistemon, kio eblas pro la nur limigita nombro de kontaktoj.

La novstila formo de internacia kunlaborado de ŝtatoj je regiona nivelo manifestiĝas en tiuj regionaj unuiĝoj, kiuj surbaze de fonda dokumento transprenis iujn el la originaj rajtoj de la suverenaj ŝtatoj. Komunaj organoj havas la kontraktitan kompetentecon memstare decidi pri tuta aro da komunaj aferoj. Tiun plej modernan formon de regionaj unuiĝoj karakterizas intima kunlaboro, kaj tio signifas multegajn kontaktojn de homoj el diversaj nacioj. Pro tio la lingva problemo de tiu ĉi regiona kunlaborado estas tre granda. En tiu fakto troviĝas la kaŭzo por la Esperanto-movado, turni sian atenton al regionaj unuiĝoj – kion ni faras per tiu ĉi Universala Kongreso.

Ne estas io por miri, ke tiuj organizaĵoj unue evoluis al sia plej klara elformiĝo en Eŭropo, la malgranda kon-

tinento kun la multaj ŝtatoj kaj la longa historio, kies elirpunkto estis ĉi tie en Ateno. La plej esencaj modeloj de internacia kunlaborado de ŝtatoj je regiona nivelo estas la Konsilantaro por reciproka ekonomia helpo en la orienta kaj la Eŭropa Komunumaro en la okcidenta Eŭropo.

Regiona kunlaborado de ŝtatoj povas en sia strikta formo apliki lingvajn regulojn en du alternativoj. Aŭ regas la principo de egala rango por ĉiu partoprenanta lingvo, aŭ ili ne estas samrajtaj, do, ekzistas laborlingvo. Ekzemplo por la laste nomita varianto estas la Konsilantaro por reciproka ekonomia helpo, en kiu kunlaboras naŭ ŝtatoj kun naŭ tre diversaj lingvoj. Naŭ estas tiel granda kvanto, ke sama uzo evidente ne eblas, kaj tial ne povis esti realigita lingva egalrajteco. Tro da uzendaj lingvoj ankaŭ en nur regionaj unuiĝoj – same kiel en Unuiĝintaj Nacioj – detruas ĉiun ideon pri samrajteco. La disdivido de lingvoj en grupojn, kiel unuflanke laborlingvoj, kaj aliflanke nur simple oficialaj lingvoj, kunportas aŭtomate lingvan diskriminacion, kio estas la ĝenerale renkontata praktiko. Ĝia ekzisto estas la instigo por ni oferti Esperanton kiel perfektan solvon.

La principa samrajteco de lingvoj estus akceptebla solvo, se ĝi funkcius. Pro tio estas tiel interese, ke ni povas rigardi tian provon en la Eŭropa Komunumaro, kie tiu principo validas. Por tiel agi la EK havis du favorajn antaŭkondiĉojn, nome ke la naŭ ŝtatoj havas nur ses lingvojn kaj ke tiuj lingvoj estas el parencaj lingvofamilioj. Lingva neŭtralisto ĝojas, kiam li vidas unu dokumenton en ses diverslingvaj eldonoj. Sed kiu rigardas la efikecon, tiu ne povas kontenti. Kaj jen kie enŝoviĝas elekto inter la ses samrajtaj lingvoj. Ekzemple, jam la malmulta spaco en statistikaj tabeloj povis doni la kaŭzon por pekado kontraŭ la memfarita principo – tie lastatempe plu aperis nur tri lingvoj el la ses. Kompreneble tiuj prioritataj lingvoj estas ne la itala, la nederlanda kaj la dana, sed estas la angla, la franca kaj la germana. La hegemoniaj lingvoj jam ŝancelas la belan provon eviti diskriminacion.

Tio estas la stato de lingvaj reguloj en regiona kunlaborado de ŝtatoj nun, kiam ni kunvenas somere de 1976 en Ateno. La greka ĉefurbo, Grekujo entute, havas por ni apartan gravecon. Por substreki la rilatojn inter ni, la kultura movado por la internacia lingvo, kaj la lando de nia nunjara Universala Kongreso, ni ne bezonas memorigi pri la klasika Grekujo. Ja antaŭ pli ol du mil jaroj grandaj ideoj aperis unuafoje, kaj konstruiĝis la fundamentoj de niaj filozofiaj ideoj kaj de niaj formoj de socia kunvivado. La grandiozaj ideoj, ĝenataj per senĉesa militado, pluefikas en nian epokon; la socio, en kiu sklavoj laboris kaj la ina duono de la

homaro estis komplete subpremita, estis pene evoluigita, sed eĉ ni ne jam atingis la belan novan mondon.

Ni ne rigardu en la historion, sed pritraktu la nuntempon kaj la estontecon. Kaj jen la Esperanto-movado kaj Grekujo havas interesan komunecon. Grekujo strebas al partopreno en la ekonomia integriĝo de la Eŭropa Komunumaro. Ĝi estas tiu ŝtato en la listo de la aspirantoj, kun kiu la intertraktado jam plej multe progresis: ĝi staras rekte antaŭ la pordo. Per tio ĝi alportas la lingvon n-ro sep al la komunaj instancoj. Se la principo ĝis nun aplikata restas valida, Grekujo pelos la Komunumaron en pligrandiĝon de la ekzistanta problemo de plurlingveco, eble eĉ necesas diri: de multlingveco. La ĉefdemando estas: ĉu Grekujo mem cedos pri sia samrajteco en la lingva kampo, aŭ ĉu ĝi insistos pri sama uzo de la greka kiel de la aliaj ses lingvoj? Se la grekoj rezignus, ne estus problemo de lingvaj komplikadoj, sed la EK estus io alia ol ĝi estis ĝis tiam, ĝi estus enkondukinta por ĝi fremdan trakton, diskriminacion. Tion timante la Komunumaro ne postulas de la grekoj rezignon je sia lingvo. Membro de la Komisiono de la EK deklaris en la februara kunsido de la Eŭropa Parlamento: "En tiu afero nia institucio dum la intertraktadoj pri ebla membreco de Grekujo ne prenos iniciaton, por ne meti tiun landon antaŭ problemon, kiu ne estis tuŝita en la intertraktadoj kun aliaj landoj."

La decido restas por Grekujo mem, kaj ni esperas, ke la greka fiero, devenanta el la klasika epoko, malebligos submetiĝon al fremdaj lingvoj. Tiam la EK estos seplingva, kaj la tago ne estos malproksima, kiam ĝi

tiel suferos je sia laborkapablo, ke efika solvo ne plu estos evitebla. En la menciita kunsido de la Eŭropa Parlamento la komisionano ankaŭ diris, ke limigoj en la tradukado jam nun okazas; li en tiu kunteksto eĉ uzis la vorton "laborlingvoj". Nur — li deklaris — leĝoj kaj dekretoj devos ekzisti en ĉiuj lingvoj, eĉ se estos iam naŭ aŭ dek aŭ dek unu. Videbliĝas je la horizonto, kaj tion kaŭzis la greka iniciato, la kutima modelo, en kiu ekzistas laborlingvoj, kaj la resto de la oficialaj lingvoj estas ne plu uzata, krom en tre esceptaj kazoj. Kiam tio estos okazinta, la bela kaj atentokapta provo de regiona unuiĝo eviti lingvan diskriminacion, estos finita. Pruviĝos tute klare, ke la konvencia vojo de lingva solvo estas sakstrato, ĉar evitenda diskriminacio staras je ĝia fino. Ne estas alia solvo ol vere neŭtrala lingvo, kaj ne ekzistas alia tia lingvo ol la Internacia Lingvo Esperanto. Ni posedas la ilon por solvi la lingvan demandon ankaŭ en la internacia kunlaborado de ŝtatoj je regiona nivelo. Tion ni denove substrekos dum nia ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto en Ateno, kaj ni estas certaj, ke la publiko ĉi tie sekvos niajn laborojn kun speciala atento pro la propra intereso, kiun Grekujo havas en la lingva kampo enirante la komunan merkaton. La konscio pri la ekzisto de lingva diskriminacio instigas nin laboregi por nia afero. Forigi diskriminaciojn estas la plej elstara tasko, kiun homoj povas meti antaŭ sin. El la diskriminacioj nia labor-kampo estas la lingva maljusteco. Ni atakas ĝin, ni evoluigas la solvon, ni venkos super tiu ĉi diskriminacio kiel aliaj venkis super aliaj diskriminacioj. Al tio kontribuu nia 61a Universala Kongreso en Ateno.

Werner Bormann

KONGRESA REZOLUCIO 1

La 61a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Ateno, Grekujo, de la 31a de julio ĝis la 7a de aŭgusto 1976 kaj diskutinte kiel ĉeftemon La Internacian Kunlaboron de Ŝtatoj je Regiona Nivelo,

notas

1. La kreskantan kaj salutindan kunlaboron inter ŝtatoj en samaj geografiaj regionoj;
2. La ofte esprimitan deziron de la ŝtatoj en samaj regionoj evoluigi siajn interrilatojn per pacaj rimedoj kaj en harmonia kunlaboro, anstataŭ per konfrontiĝo kaj malamikeco;
3. La antaŭvideblan intensiĝon de tiuj regionaj interrilatoj en la estonteco;

atentigas

1. Ke esenca elemento en la ĝusta kaj justa rilatado de la ŝtatoj estas egaleco de lingvoj, kiel nun penas apliki certaj internaciaj regionaj organizoj;
2. Ke tiu lingva egaleco estas tre multekosta kaj ne-

efika se ĝi ne estas atingata per pontaj lingvoj, kiu neŭtrale ligu la diversajn ŝtatojn-membrojn;

3. Ke la neŭtrala kaj esprimkapabla Internacia Lingvo Esperanto reprezentas idealan tian pontan lingvon, taŭgan por oficiala utiligo en internaciaj organizoj;
4. Ke Esperanto, pro sia facila lernebleco, ankaŭ aparte bone taŭgas por senpera kontaktado inter la ordinaj civitanoj de najbaraj landoj;

kaj alvokas

1. Al la diversaj internaciaj regionaj organizoj, ke ili studu la eblecon utiligi Esperanton kiel lingvon de dokumentado kaj eventuale lingvon de administrado kaj debato, kaj ke ili antaŭenigu ĝian utiligon en la propraj regionoj;
2. Al la diversaj ŝtatoj, ke ili antaŭenigu la instruadon kaj utiligadon de Esperanto por ĉiaj homaj kontaktoj inter lingvaj grupoj el la koncernaj regionoj;
3. Al la regionaj organizoj kaj la unuopaj ŝtatoj, ke ili komune realigu la jam ekzistantajn interkonsentojn kiuj celas faciligi la homan kontaktadon trans naciaj limoj kaj la reduktion aŭ eliminon de lingvaj baroj aŭ lingva diskriminacio.

Ne nur pri pretendoj, sed ankaŭ pri sukcesoj

Simile al la pasintjara Kongreso, ankaŭ en Ateno "mankis" festparolado. Ĝian lokon denove prenis detala prezento de la aktuala stato de la Movado. Post plurlokaj koncizigoj (ĉefe ĉe temoj, kiujn nia revuo jam amplekse traktis), ni ĉi tie publikigas la malferman paroladon de la prezidanto de UEA.

PASINTJARE mi raportis al vi precipe pri promesoj kaj esperoj. La situacio de nia Asocio, kaj de la Esperanto-movado kiu ĉirkaŭas ĝin, signife ŝanĝiĝis inter Kopenhago kaj Ateno. Ĉi-jare eblas paroli ne nur pri estonteco sed pri jamaj solidaj atingoj, ne nur pri pretendoj sed ankaŭ pri sukcesoj. Mi ne volas sugesti, ke ĉiuj niaj problemoj malaperis kvazaŭ miraklo (iasence, la veraj problemoj nur komenciĝas), sed ke la ĝenerala strategio de UEA en la nuna tempo ŝajnas esti prava kaj komencas alporti fruktojn.

Tiu strategio enhavas tri ĉefajn elementojn: unue, plifortigi kaj pliglatigi la internan funkciadon de la Asocio; due, sisteme labori por unuecigi la Esperanto-movadon en spirito de toleremo kaj kunlaboremo; kaj,

trie, pli klare kaj emfaze prezenti Esperanton al la ekstera mondo.

Nia membraro estas nun bone informita pri la agado kaj planoj de la Asocio. Ampleksaj artikoloj en la aprila, maja kaj junia numeroj de la revuo prezentis la financon situacion de la Asocio kaj niajn estontajn financajn kaj administrajn planojn; la julia-aŭgusta numero estis komplete dediĉita al la Estrara Raporto. Tiu nivelo de informiteco pri la aferoj de la Asocio estas tre salutinda — kaj ne nur ĉar ĝi faciligas nian nunan taskon. Bone informita membraro estas membraro enplektita en la aferojn de la Asocio — kiu sentas respondecon pri la Asocio. UEA ja ne estas, aŭ ne devus esti, senpersoneca, senvizaĝa burokratio. Ĝi estas vivanta organizo, el vivantaj homoj, kaj ĝia ĉefa ekzistokialo estas fari ŝanĝon — fundamentan ŝanĝon en la internacia socio sur la lingva kampo. Ni ne estas, aŭ ne devus esti, organizo en rutino, sed organizo en kampanjo.

Tion ŝajne komprenas niaj membroj. Viaj lojaleco kaj subteno komencis transformi nian asocion en la pas-

Salutoj de ĉiuj mondpartoj

DIMANĈON POSTTAGMEZE (la 1-an de aŭgusto), denove en la festsalono de la Hotelo Hilton, je la 5a horo komenciĝis la dua parto de la inaŭgura solenaĵo, la t.n. Malfermo de la 61a UK. Tiun ĉi solenaĵon enkondukis la vortoj de d-ro W. Bormann, per kiuj li esprimis sian respekton al la kuraĝa greka movado, kiu malgraŭ sia nesufiĉa organiziteco estis preta aranĝi la Universalan Kongreson.

La salutvicon de la reprezentitaj 29 aliĝintaj landaj asocioj de UEA malfermis la ĉefdelegito de Aŭstralio, s-ro Linton. Poste sekvis Aŭstrio, Belgio kaj en alfabeto vico la reprezentantoj de la landaj asocioj de Brazilo, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francio, FR Germanio, Hispanio, Hungario, Islando, Israelo, Italio, Japanio, Jugoslavio, Kanado, Luksemburgo, Nederlando, Norvegio, Nov-Zelando, Pollando,

Sud-Afriko, Svedio, Svislando kaj Usono. S-ro Ostropolski, reprezentanto de la argentina asocio, kiu ne ĉeestis ĉe la komenco, fermis la vicon de la salutantoj el landoj kun landa asocio aliĝinta al UEA.

Poste sekvis salutvortoj de reprezentantoj de landaj asocioj nealiĝintaj al UEA, entute el ses landoj: Germana Demokratia Respubliko, Kolombio, Suda Koreo, Meksikio, Slovakio kaj Soveta Unio. Salutis ankaŭ du reprezentantoj el landoj sen organizita movado: el Egiptio kaj Peruo. Granda aplaŭdo akompanis la vortojn de s-ro Megalli, kiu post 25-jara vivado en eksterlando decidis reiri al Egiptio, kaj reorganizi Egiptan Esperanto-Asocion. Kiel lasta salutis reprezentanto de la gastiganta landa asocio, tiu de Helena Esperanto-Asocio, kies amikajn vortojn la kongresanoj akceptis kun granda aplaŭdo. Entute salutis la Kongreson reprezentantoj de esperantistoj el 38 landoj de ĉiuj kontinentoj.

La dua parto de la Malfermo konsistis el longa parolado de la prezidanto de UEA. Vi trovos tiun paroladon sur ĉi tiu kaj la sekvaj paĝoj de la revuo.

La solenaĵo finiĝis per komuna kantado de La Espero, gvidita de la bulgara koruso el Târgoviște.

intaj monatoj. Por mi persone, kiel por multaj miaj kolegoj, la plej inspira evoluo de la jaro estis la eksterordinara nivelo de kunlaboremo, helpemo, komprenemo, kiu elverŝiĝis al UEA. Ĝi unue manifestiĝis en Kopenhago: etoso unike harmonia refreŝigis niajn animojn kaj donis al ni senton de direkto kaj konscion de celo. Estis ne nur plaĉe sed ĝojige esti esperantisto — spirito rara sed rekaptita. Tiu spirito aperis ankaŭ en la Volontula Servo. Kiam la Estraro akceptis la proponon starigi Volontulan Servon, en kiu niaj anoj, plejparte junaj, laboru flankalflanke kun profesiuloj, precipe en la Centra Oficejo, ni ne estis plene konvinkitaj pri ĝia sukceso. Sed ni subtaksis la spiriton de niaj membroj. La sukceso de la Volontula Servo estas la ĉefa nova faktoro, kiu ebligis la kelkrilate okulfrapan retrovon de nia financa kaj administra ekvilibro. Deficito de 60 000 guldenoj en 1973 fariĝis gajno de 26 000 guldenoj en 1975. La kapitalo kreskis je 26 procentoj. Kaj por 1976 ne necesis altigi la kotizojn kaj fariĝis eble haltigi la perdon de membroj.

Ankaŭ la donacoj al la Asocio — bona indikilo pri la animstato de la membraro — montris eksterordinaran kreskon. Dum en 1973 la donacoj al la Ĝenerala Kaso sumis je proksimume 1500 guldenoj, ĝis 1975 ili okobligis, tiel ke en tiu jaro ili atingis preskaŭ 13 000 guldenojn. Se oni konsideras, ke la donacoj al la Ĝenerala Kaso estas ĉiam relative malgrandaj (la vere grandaj fluas rekte en la kapitalan konton), oni tuj vidas ke multiĝis ne nur la guldenoj sed ankaŭ la donacantoj. La Societo Zamenhof, starigita antaŭ du jaroj, logis iom pli ol 170 membrojn en la tuta 1975. Kaj por la nuna jaro jam la membraro de la Societo atingis la nombron 200.

La frapaj kreskoj en donacoj ne inkluzivas la jamajn donacojn al la Financa Programo de la Esperanto-

Movado, kiu, ĉefe dank' al la eksterordinara malavareco de unu anonimulo — kiu kvazaŭ per unu bato donis al ni la bazon por tiu kvanta kresko de nia agado, kiu tiel necesas — jam atingis preskaŭ 60 000 guldenojn. Parton de tiu sumo ni reinvestos en la Programo mem, tiel donante al ni la rimedojn por sisteme serĉi financadon ekster la Esperanto-movado. Eĉ la plej bonaj ideoj perdiĝas se iliaj adeptoj ne scias kiel prezenti ilin al la mondo. En la moderna mondo de tumulta politiko, amasmedioj, internacia komerco, fulmrapidaj komunikiloj, la enpenetro de Esperanto postulos grandajn rimedojn. Tio estas eĉ pli evidenta se oni konsideras, ke la ideo de Esperanto ne estas ĝenerale akceptita — ke necesas ne nur alporti Esperanton al la homoj sed konvinki ilin. Nia idealo realiĝos nur tiam kiam ni sukcesos esti ne nur aŭskultataj sed ankaŭ respektataj, ne nur pledi antaŭ la homoj sed efektive gvidi la homojn al solvo de la lingva demando. Kaj tiu celo ne estas nerealisma: ĝi ne superas niajn kapablojn. Tion abunde pravas la eksterordinara vivkapablo de nia Esperanto-movado kaj, plej lastatempe, la eksterordinara apogo kiun donas al UEA ĝia membraro.

Kaj, ke nia kulturo floras, tion pravas simpla konstato de faktoj. Kvankam neniu povas esti kontenta ĉe kampo tiel neelĉerpeble granda, ni povas konstati kuraĝigan multiĝon de Esperanto-eventoj, eldonaĵoj, literaturaj konkursoj, scienca utiligo de la lingvo. La revuo *Scienca Mondo* ekaperis en Esperanto, la Someraĵ Universitataj Kursoj floras, senteblo fortiĝo en la universitata interesiĝo pri Esperanto okazis ekzemple en Budapeŝto kaj Paderborn; la Kultura Centro Esperantista en Svislando, eldona aktiveco en Japanujo, universitata agado en Sudameriko, lernejoj eksperimentoj en Eŭropo kaj Afriko — ĉio ĉi implicas, ke Esperanto vivas, floras kaj fortiĝas. En kelkaj landoj lastatempe ni rimarkis rapidiĝon de la ritmo — en la parlamenta agado, informado, kulturo. La estonteco de la Internacia Lingvo dependas ne de unu homo, aŭ grupo de homoj, ne de estraro, aŭ komitato aŭ eĉ unu asocio. Se oni ne jam tion konstatis, oni konstatu nun, ke la Esperanto-movado enradikiĝis en la kulturan vivon de nia mondo: ĝi estas nedetruibla, firma, konstanta — kaj mankoj ĉe UEA, malfruiĝo de la revuo, misoj ĉe Universalaj Kongresoj, povas ĝeni ĝin, sed ne detrui ĝin. La tasko de niaj organizoj (krom eviti tiujn misojn ...) estas kunordigi, nutri kaj kultivi la talentojn de la esperantistoj laŭ sukcesa vojo — ne dikti sed persvadi, ne dekreti, sed instigi.

El tiu konstato kreskis la dua elemento en la strategio de UEA — unuecigo de la movado. Ĝi havas du aspektojn: forigon de superfluaĵoj, kaj kreon de aktiva kunlaboro. La malakordoj inter UEA kaj kelkaj Esperanto-asocioj (fenomeno pli-malpli konstanta dum multaj jaroj) eliminiĝas. Kun la instruista ligo, ekzemple, ni lastatempe denove starigis kunlaboron, tiel ke la vojo estas nun malferma al ellaboro de plena kaj ampleksa programo por la instruado de Esperanto — programo kiu inkluzivu ne nur la lernejan instruadon (kampo de la instruista ligo) sed ankaŭ la neformalan,



Kongresanoj atente aŭskultis la paroladon: "La plej inspira evoluo de la jaro estis la eksterordinara nivelo de kunlaboremo, helpemo, komprenemo, kiu elverŝiĝis al UEA."

en klubaj kursoj ktp.; kaj kiu inkluzivu ankaŭ programon de kunlaboro inter la ligo kaj UEA sur la tereno de eksteraj rilatoj — la rilatoj kun registaroj kaj edukaj instancoj. Tiu afero estos unu el niaj ĉefaj prioritatoj dum la venontaj monatoj.

Ni vastigis nian kontaktadon kun la landaj kaj fakaj asocioj. Plurajn novajn ni povis akcepti en la sinon de UEA. Kvankam niajn rilatojn kun landaj asocioj regas la preskriboj de la Statuto de la Asocio, principe ni opinias, ke la universaleco de UEA, la proksima kunlaboro kun ĉiuj esperantistoj, diktas kiel eble plej grandan vastigon de la Asocio por enpreni la diversajn landajn movadojn kie tio eblas sur la bazo de interalie la politika neŭtraleco.

Sed, karaj gekolegoj, estas foje malfacile esti esperantisto. Ni laboras kontraŭ jarmiloj de senscio, ni klopodas akceptigi ideon tiel grandan, ke ĝi ŝajnas preskaŭ timiga al la ekstera mondo. La progreso estas malrapida, pena, laborpostula. De tempo al tempo homoj laciĝas pri tiu giganta tasko. Estante homoj, ili emas vidi en malrapida progreso ne la malfacilaĵojn de la tasko sed la mankojn, eĉ la sabotadojn, de aliaj. Ili emas flari komplotojn kie ili ne ekzistas, bojkotojn kie ili ne troviĝas, cenzuradon kie ekzistas nur bona volo. En Kopenhago mi alvokis al kelkaj tiaj homoj, kiuj lastatempe perdis sian fidon je UEA, reveni al ĝi. Kelkaj tion faris. Pasis nun unu plia jaro. UEA ne pereis, Esperanto ne detruigis, la movado ne disfalis, la Asocio ne politikiĝis, kaj la reputacio de Esperanto en la ekstera mondo certe ne malkreskis — eĉ male: en multaj lokoj ni gajnis novajn sukcesojn. Ni bezonas kritikadon: neniu homo estas perfekta, ankaŭ ne gvidantoj de UEA. Sed ni bezonas inteligentan kritikadon, bazitan sur faktoj, racie argumentitan, firme prezentitan. Tamen, la vojo de malkonsento ne estu turniĝo al la neesperantista gazetaro per fantaziaĵoj pri Esperanto kaj UEA, kiuj buntigas la paĝojn de nacilingvaj ĵurnaloj sed antaŭenigas Esperanton eĉ ne unu centimetron. Tiu vojo estas sakstrato — kaj la pasintaj du jaroj pruvis ĝin sakstrato.

Malgraŭ tiuj ĉi makuletoj, la animstato de UEA, ĝiaj gvidantoj, ĝiaj programoj, estas escepte bona. Ni koncentras niajn energiojn je la ĉefa tasko: la konservado kaj plifortigo de la Esperanto-movado kaj la efika prezento de Esperanto al la ekstera mondo. Kiam temas pri ĉi-lastaj, ni devas konstati, ke la mondaj cirkonstancoj subtile ŝanĝiĝis. La malnovaj argumentoj por Esperanto, kvankam ili multilate retenas sian aktualecon, bezonas akriĝon, plivastigon; kaj necesas aldoni novajn. Jen unu el la kialoj malantaŭ nia nova serio de *Konsilaroj pri Esperanto-Agado* (el kiuj kvin aperis ĝis nun). Jen la kialo malantaŭ unu el la temoj de la nuna kongreso: "Kiel nuntempe argumenti por Esperanto?"

Oni argumentas, ke la mondo bezonas Esperanton, por forigi la nunan lingvan kaoson, ekzemple en internaciaj organizoj. La Monda Organizo pri Sano elspezos 12 milionojn da guldenoj por enkonduki la araban kaj ĉinan lingvojn — monon kiun alikaze oni povus utiligi

efektive por sanigi la homojn; Unesko en sia nova buĝeto antaŭvidas aldonon de preskaŭ 2 milionoj da guldenoj por plivastigi la utiligon de la araba kaj hispana; en la Eŭropa Komunumaro, unu oficisto el kvar laboras en la lingvaj servoj. Kiel ia neregebla kreskaĵo en la internaciaj organizoj, la lingvaj servoj grandiĝas kaj ampleksiĝas. Samtempe la laborkapablo de tiuj organizoj ŝrumpas. Unesko ĉi-jare festas sian tridekan datrevenon. Ni gratulos ĝin je tiu okazo, sed ni ankaŭ jam atentigis al ĝi, ke Unesko ne solvis sian lingvan problemon, ne sufiĉe okupiĝas pri la lingvaj problemoj ĝenerale.



Sed la kreskanta ekonomia kaj politika integriĝo de la mondo alportis improviziajn solvojn al la lingva problemo. Dank' al vastega investo, la landoj de okcidenta Eŭropo, kaj de pluraj aliaj mondopartoj, sukcesis produkti konsiderindan nombron da homoj kiuj parolas aŭ paroletas la anglan lingvon. Ili do kapablas komunikiĝi kun anglalingvanoj. Kvankam kiel konvinkitaj internaciistoj ni ĝojas, ke la diversaj nacioj interesiĝas pri la senpera komunikado de iliaj civitanoj kun tiuj de aliaj landoj, ni bedaŭras ke tio ne okazas en spirito de reciprokeco. Tiu anglomanio rezultis almenaŭ parte el la simpla rifuzo de anglalingvanoj uzi aliajn lingvojn — kaj la preteco de alinacianoj submetiĝi al tio. Kaj tio, karaj gekolegoj, estas klasika ekzemplo de lingva diskriminacio — eĉ se ĝi estas ne konata kiel tia flanke de la politikistoj kiuj tiel fordonis la propran heredaĵon. Kiam ili fine komprenos, ke ekzistas alternativo — alternativo al tiu vasta investo, al tiu pozicio de malplivaloro, al tiu submetiĝo al aliaj kulturaj valoroj? Tiu alternativo estas la Internacia Lingvo Esperanto. Ni daŭrigos nian atenton al la registaroj kaj internaciaj organizoj pri la kostoj de multlingveco kaj pri la alternativo, kiu jam ekzistas. Sed ni dediĉos multe pli da atento al aspektoj de lingva diskriminacio. Ni estas firme konvinkitaj, ke la lingva problemo ne estas nur ekonomia problemo sed ankaŭ morala demando.

La trudado de la propraj valoroj al aliaj estas politike kaj morale neakceptebla. Tion rekonis lastatempe la enloĝantoj de Soweto, tion rekonas la kebekanoj, tion rekonas la usonaj parolantoj de la hispana.

Dum la venontaj monatoj UEA eldonos sian unuan dokumenton pri lingva diskriminacio. Espereble aliaj sekvos. La Centro de Esploro kaj Dokumentado dediĉos apartan atenton al la edukado de nia membraro pri aspektoj de la lingva problemo. Samtempe UEA fortigos sian agadon ĉe internaciaj organizoj. Jam de jaroj ni agadas ĉe Unesko kaj Unuiĝintaj Nacioj, sed lastatempe fondiĝis laborgrupoj ĉe ambaŭ organizoj — pli laborkapablaj ol la unuopaj reprezentantoj kiuj gvidis niajn aferojn tie antaŭe. Kaj aldoniĝas ankaŭ agado en Bruselo, ĉe la Eŭropa Komunumaro; en Tokio, ĉe la Universitato de Unuiĝintaj Nacioj, en Vaŝingtono, ĉe la Organizo de Amerikaj Ŝtatoj. Ligas kaj kunordigas tiun agadon la organiza aparato de UEA. Ni sistemigas nian informadon, eldonas dokumentojn, intervenas persone kiam tio eblas. Dum la jaro 1976-77 ni povas antaŭvidi intensiĝon de tiu agado. La rezultoj ne venos rapide, ĉar la konvinkado de influaj homoj neniam estas facila. Sed ili venos.

Parte ili dependas de efika agado en la unuopaj landoj. Ankaŭ tie la progreso estas kuraĝiga. La parlamenta agado, komence limigita nur al kelkaj landoj, nun vastiĝas. En pluraj landoj parolantoj de Esperanto aktive laboras en parlamentoj kaj partioj por havi efikon ĉe la lingva politiko en la koncernaj landoj kaj por antaŭenigi Esperanton. UEA mem kontribuas per konsilaroj, dokumentoj kaj novaĵletero kiu ligas la aktivulojn en la diversaj landoj.

Rezultoj dependas ankaŭ de sistemaj klopodoj konvinki la intelektulojn kaj universitatanojn en la diversaj landoj pri la fenomeno lingva diskriminacio kaj pri la bezono de internacia lingvo. Samtempe necesas ankaŭ influi la vastajn tavolojn de ordinaraĵoj pri la valoro de internacia komunikado — eĉ pri la rajto al tia komunikado per facile lernebla, neŭtrala rimedo, nome la Internacia Lingvo.

Sed laboro ĉe naciaj registaroj kaj ĉe internaciaj institucioj ne igu nin neglekti tiujn personojn kiuj ne tiel avantaĝe postenas kiel la diplomatoj kaj la internaciaj funkciuloj. Mi pensas unuavice pri la neregistaraj organizoj — do, organizoj kiel la nia, kiuj tamen uzas plurajn laborlingvojn. Ili dependas de maksimuma partopreno de la membroj — sed mankas al ili rimedoj por vere efikaj lingvaj servoj. Malmultaj el ili rekonas, ke la lingva problemo postulas ilian atenton: ili ne konscias entute, ke ĝi estas solvebla.

En tiu ĉi rapida trarigardo de niaj ĉefaj prioritatoj, kaj la perspektivoj por la estonteco, mi malmulton diris pri pluraj aliaj gravegaj demandoj. Mi nenion diris pri niaj kongresoj. Ankaŭ ĉi-jare vi rimarkos ŝanĝojn en la kongreso kompare kun antaŭaj jaroj. Ili celas ĉefe ligi vin pli firme al la laboro de la Asocio — kaj ili dependas de via aktiva partopreno kaj via preteco demandi, kritiki, kontribui en la koncernaj kunvenoj. Mi diris nen-

ion pri la junularo, kaj pri nia espero, ke la ligoj inter TEJO kaj UEA fortiĝos dum la venonta jaro, kaj ke la vere gratulinda laboro de la junularo havos pli profundan efikon ĉe la ĝenerala Esperanto-movado. Se ni frontas la venontan jaron pli fortaj, pli optimismaj, pli konvinkitaj ol antaŭ unu jaro, tion ni ŝuldas al du faktoroj — al la bona volo de nia membraro, kaj al la sindona laboro de niaj aktivuloj. Tiu laboro ne sufiĉas — ĝi ne povos sufiĉi dum Esperanto ankoraŭ ne atingis ĝeneralan akceptiĝon. Sed, karaj gekolegoj, ĝi estas bona komenco. Ni havas devon, ni havas respondecon antaŭ la mondo proponi kaj sukcesigi nian solvon al tiu alimaniere nesolvebla problemo — la problemo de la lingvo. La vojo estos longa, sed ĝi estas inda kaj necesa vojo. Ni trovu la forton ĝin sekvi.

Humphrey Tonkin

KOMITATAJ KAJ ESTRARAJ KUNSIDOJ:

Efikeco de la Komitato

EBLE EN LA TUTA HISTORIO de UEA la Asocio neniam havis tiom da komitataj kaj estraraj komisionoj, komisiitoj, laborgrupoj kaj aferŝarĝitoj kiel estas nun. Klopodu foje atente trastudi ilian kvarpaĝan liston en la Jarlibro, konsciante, ke inter la finredakto kaj aperdato de la Jarlibro regule aldoniĝas kelkaj pliaj komisionoj. Ne maloftas demandoj pri la utilo de tiom da komisionoj kaj respondeculoj, foje oni aŭdas asertojn kontestantajn la efikecon de tia laborstilo. Tamen, por plene konvertiĝi al senrezerva apoganto de la nuna agadmaniero sufiĉis ĉeesti unu el la sep komitataj kunsidoj en la 61a UK. Ĝuste tiuj komisionoj kaj laborgrupoj komplete ŝanĝis, revoluciigis la laboron de la Komitato kaj sekve ankaŭ la agadon de la tuta Asocio. Ne estas troigo aserti, ke oni al tiuj komisionoj ŝuldas la fakton, ke ni nun havas efikan Komitaton kaj dinamisman Asocion. Ankaŭ pli frue ekzistis komisionoj, sed ili ĉefe estis dumkongresaj grupiĝoj de komitatanoj, kiuj, neinformitaj kaj nepreparitaj por la tasko, malgraŭ sia tuta bonvolo kapablis per sia supraĵa pritrakto de temo kaj sekva kaj simila rekomendo al la Komitato komplete detrui tutjaran klopodon kaj laboron de la Estraro aŭ alia asocia instanco. Nuntempe la Komisiono pri financo kaj administrado — por doni ekzemplon — kunsidas preskaŭ ĉiumonate kaj pli-malpli parkeras la aktualan buĝeton, kio helpas al ĝi ne nur havi superrigardon pri la asociaj financoj, sed plene regi la situacion; siavice, tia komisiono aperas antaŭ la Estraro kaj Komitato tiel armita per argumentoj, ke neprudentaj financaj paŝoj fariĝas plene maleblaj. Ni diris, ke okazis sep komitataj kunsidoj en Ateno. Tamen, tian adjektivon devus havi ankaŭ ĉiuj komisionaj kaj kelkaj aliaj kunsidoj en kiuj oni traktis dem-

andojn, kiuj poste aperis antaŭ la Komitato, des pli ke ankaŭ tiujn kunsidojn ofte partoprenis granda nombro da interesitaj komitatanoj. Raporti nun ĉi tie pri ĉiuj temoj kaj decidoj traktitaj kaj faritaj en Ateno, fariĝas malfacile, sed — feliĉe — ankaŭ ne aparte necese. Tiuj temoj jam konsistigas kaj ankaŭ estonte konsistigos la ĉeftemaron de ĉiu unuopa numero de nia revuo. Rezignante tial pri pretendo kvazaŭ protokole detali pri la komitataj kunsidoj, ni traktas ilin samrange kun aliaj kongresaj aranĝoj kaj notas nur la plej intereskapajn eventojn.

Malsimile al la ĝisnunaj spertoj, la Estrara Raporto, inkluzive de la spezoj kaj bilanco por la pasinta jaro, ne provokis lancorompan batalkampan debaton en la Komitato. Tiel verŝajne eĉ decas kiam la jaro finiĝas per konsiderinda profito. Anstataŭe, la Komitato dediĉis sufiĉan atenton al la Financa Programo de la Esperanto-Movado kaj aprobis la entreprenitajn paŝojn kaj la planojn, kiujn ni amplekse prezentis en la junia numero de la revuo. Tamen, alia financa demando en Ateno serioze minacis makuli — jes, ĝuste tiel peza vorto — la efikan laboron kaj atmosferon en la Komitato. Temas pri la kontoj de la 58a UK en Beogrado en 1973. Tiu demando jam tri jarojn preskaŭ ĝis krevo streĉas la rilatojn inter UEA kaj Jugoslavia Esperanto-Ligo. Dank' al ambaŭflanka komprenemo, atingita en vere maratonaj intertraktadoj (eĉ dum la ekskursatago), la demando nun estas definitive solvita: La Komitato konsentis remalfermi la kontojn de tiu kongreso kaj starigis komisionon (Corsetti, Greutert, Zlatnar), kiu, interkonsente kun UEA kaj JEL, administros specialan fondaĵon, kiu disponos pri la disputita sumo el la beograda profito. Tiu fondaĵo (temas proksimume pri 6 000 gld.) estos utiligata ekskluzive por progresigi la Movadon en la evolulandoj de la t.n. Tria Mondo.

Post iom frosta rekomendo de la Estraro, la Komitato kun granda plimulto favore decidis pri la aliĝo de la landa asocio en Germana Demokratia Respubliko. Tiel la Centra Laborrondo Esperanto fariĝis aliĝinta landa asocio de UEA, kio signas finon al kelkjara klopodo politikumi pri la demando kaj sendube estas plia paŝo al la universaleco de UEA. Eventuale, ĉi tiu aliĝo povas esti taŭga kialo reekzameni la demandon, ĉu la landaj asocioj per sia aliĝo al UEA perdas sian suverenecon ankaŭ interne de la ŝtatoj en kiuj ili agas. La Komitato akceptis aliĝojn ankaŭ de la Asocio de Esperantistoj en Slovakio kaj Korea Esperanto-Asocio. La tri novaj landaj asocioj delegis en la Komitaton s-rojn R. Graetz, P. Rosa kaj So Gilsu.

Estas aparte interese, ke oni en Ateno jam ĝis tiu grado pensis pri la venontjara Kongreso, ke la Komitato ne nur decidis pri la kongresa ĉeftemo — ĝi estos "La rajto je komunikado" —, sed ankaŭ elektis trimembran komisionon, kiu okupiĝos pri kandidatoj por la venontjaraj elektoj; la komisionon eniris s-roj Anjer, Aleksiev kaj Kühlmann.

Pluraj aliaj demandoj, kiujn ni ne tuŝas ĉi tie, kaj kiuj estis traktitaj en la komitatkunsidoj en Ateno (la nova Statuto, CED, landa kaj faka agadoj, kulturo, inform-



Dum unu el la atenaj kunsidoj de la Komitato: Efikeco kiel rezulto de nova laborstilo.

ado k.a.) ricevos apartan spacon en unu el niaj sekvan-taj numeroj.

Necesas fine diri, ke la nova laborstilo de la Komitato — delegi pristudon de difinita demando al unu el siaj komisionoj, aŭdi raporton de tiu komisiono kaj decidi pri la raporto — grandioze kontribuis al la serenigo de la atmosfero en la komitatkunsidoj, kie oni nun — imagu! — ne malofte eĉ havas tempon spriti kaj ridi, tiel ke ne plu estas puno iri al la kongresoj kiel komitatano.

* * *

Male al la Komitato, la Estraro en Ateno montriĝis ekstreme malefika; ĝi apenaŭ sukcesis ekmordi sian ampleksan tagordon. Oni pli-malpli venas al la konkludo, ke la estraranoj, havantaj tiom da aliaj taskoj dum la kongresa semajno, estonte eĉ ne planu dum la kongresoj trakti aliajn demandojn, ol tiujn kiuj rekte tuŝas la aktualan kongresan programon.

S. Milojević

KONGRESA REZOLUCIO 3

La 61a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Ateno, Grekujo, de la 31a de julio ĝis la 7a de aŭgusto 1976, diskutis kiel "internan" ĉeftemon la demandon "Kiel nuntempe argumenti por Esperanto?" Ĝi notis, ke antaŭ ĝuste dudek jaroj, la 30an de julio 1956, reprezentantoj de la Informaj Fakoj de UEA, en kunveno en Frostavallen, Svedujo, akceptis Fundamentan Principaron de Informado pri la Internacia Lingvo, kiu fariĝis ŝlosila dokumento en la informaj metodoj de UEA kaj la Esperanto-movado ĝenerale. Tiu Principaro de Frostavallen, kiu enkondukis novan periodon en la Esperanto-informado kaj unuafoje kodigis la plej gravajn principojn, restas aktuala ankoraŭ hodiaŭ.

La Kongreso rekomendas al la Esperanto-organizaĵoj je ĉiuj niveloj, kaj al la unuopaj parolantoj de Esperanto, daŭrajn evoluigon kaj aplikon de modernaj kaj trafaj metodoj de informado kaj regulan interŝanĝon de materialoj kaj ideoj sur tiu kampo.

Laborkunsidoj

LA UNUAN ĜENERALAN KUNSIDON de UEA malfermis s-ro Wensing, ĝenerala sekretario de la Asocio, kiu prezentis la Estraran Raporton 1975/76, aperintan en la julia-aŭgusta n-ro de nia revuo. La ĉeestantoj — iom malpli ol 100 — faris plurajn demandojn al la estraranoj, pri diversaj kampoj de la aktivado de UEA. Interalie, estiĝis diskuto pri la malkresko de la individua membraro, kion s-ro Woessink, estrarano pri financoj, klarigas unuavice per la inflacio kaj ĝia sekvo — troe altigata membrotizo. Tuŝis la problemon de kotizo ankaŭ la alparolo de s-ro Tiŝljarski, kiu proponis starigon de aparta kotizo por gejunuloj, kiu ne superu 10 guldenojn.

D-ro C. Minnaja insistis pri solvo, laŭ kiu aliĝintaj fakaj asocioj ne fariĝu sensuverena parto de UEA, perdante tiel la eblecon rekte sin turni al diversaj internaciaj instancoj, ekz. Unesko.

Pluraj ĉeestantoj esprimis sian malkonsenton pro la decido de la Estraro de TEJO okazigi la venontjaran Internacian Junularan Kongreson en Francio, anstataŭ en Islando. Prezidantino de TEJO, C. Nourmont-Moon, en sia respondo emfazis precipe la financon kaŭzon de la decido.

Krome, oni faris demandojn kaj proponojn pri financoj ĝenerale, pri la Institucio Hodler, pri libroeldonado, *Esperanto-dokumentoj*, eventuala translokiĝo de la CO de UEA ktp. El la diskuto pri nia revuo estis interese konstatita, ke la plimulto bonvenigis la dediĉon de unu tuta revunumero al la Estrara Raporto, ĉar, kvankam tio atencas la necesan temvarion, ĝi estas maksimuma trafotrafiteco rilate la informitecon de la membraro pri la agado de la Asocio.

Interesa propono aŭdiĝis de s-ro A. Sekelj (Jugoslavio), kiu pledas, ke UEA (simile al UN kaj Unesko) sisteme koncentru sian agadon al disvastigo de Esperanto en difinitaj fakaj medioj kaj tiucele proklamu anticipe bone preparitajn kampanjojn sub la nomo de jaroj, ekz.

”Jaro de Sporto”, ”Jaro de Fervojoj” ktp.

LA DUA ĜENERALA KUNSIDO DE UEA:

TRADICIE, dum ĉi tiu kongresa aranĝo oni traktas la kongresan ĉeftemon. Tiel okazis ankaŭ en Ateno. Tamen, kvankam la kongresa programo antaŭvidis tri horojn por la kunsido, denove montriĝis, ke tio ne sufiĉas por funde trakti kongresan ĉeftemon. Tial oni en Ateno ne nur aŭdis rimarkojn ĉi-rilate, sed ankaŭ notis rekomendon de la Komisiono pri kongresoj kaj konferencoj, ke estonte pluraj kongresaj aranĝoj estu dediĉitaj al la kongresa ĉeftemo.

”Internacia kunlaboro de ŝtatoj je regiona nivelo”, kio estis la atena ĉeftemo, unue estis traktita en formo de

podia diskuto, kiun partoprenis C. Nourmont-Moon, G. Leon-Smith, H. Tonkin, R. Corsetti, R. Graetz kaj H. Frank. La diskutantoj klopodis analizi la lingvan flankon de internaciaj regionaj ŝtatgrupiĝoj, kun aparta atento al la orienteŭropa Konsilio pri Reciproka Ekonomihelpo kaj la okcidenta Komunumaro. Atentigante pri la avantaĝoj de la interŝtata labordivido, oni aparte emfazis la obstaklojn de la multlingveco en tiaj ŝtataj grupiĝoj. Kompreneble, ke specialan pritrakton ricevis Esperanto kiel rimedo por konservi la nacian bazon de la plurlingveco, sed kun samtempa atingo de internacia administra unulingveco kaj tiel ankaŭ de lingva egalrajteco je internacia nivelo.

En sia parolado, kiu sekvis post la podia diskuto, la prezidanto de UEA traktis la rilatojn de la Esperantomovado al la Fina Akto de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo. Post broŝureto, kiun pri tiu temo eldonis UEA en sia serio de konsilaroj, nun oni havas ankaŭ la kompletan tekston de la Fina Akto, kiu en Esperanto ĵus aperis en Ĉeĥoslovakio.

La kunsido traktis ankaŭ la tekston de la Rezolucio 1, kiun vi trovas sur la p. 141.

SOLENA FERMO:

Pokalo al Svedio



SIMILE AL KOPENHAGO pasintjare, la Solena Fermo de la 61a UK en Ateno transformiĝis en imponan solenaĵon, kiun ĉeestis preskaŭ la tuta kongresanaro. En la kutima tagordo de la fina kongresa aranĝo (raporto pri la kongresaj laboroj, Belartaj Konkursoj, prezento de la kongresaj rezolucioj, transdono de la kongresa flago ktp.), evento estis la unuafoja aljuĝo de la Pokalo Fyne (sur la foto) al la plej sukcesa landa asocio de UEA en la jaro 1975. La pokalon gajnis Sveda Esperanto-Federacio, i.a. pro ekzempla informlaboro pri Esperanto kaj precipe pro malavara apogo al la Societo Zamenhof. Novaĵo en la Solena Fermo estis ankaŭ la fakto, ke post la tradiciaj himno kaj adiaŭa aplaŭdo, sekvis tre agrabla evento: akcepto por ĉiuj kongresanoj, dum kiu oni havis eblecon interŝanĝi lastajn salutojn ĉe glaso da refreŝigaj trinkaĵoj aŭ ĉe guteto da greka brando ”uzo”. Tiel finiĝis en senmakule harmonia etoso la 61a UK en Ateno. Tiu etoso ne plu estis surpriza, ĉar ĝin aŭguris jam la pasintjara Kongreso en Kopenhago.

Evento: La unua premio por prozo – aljuĝita!

ENIRIS la Konkursojn ĉi-jare entute 61 eroj, el kio 27 poemoj, 26 prozaĵoj, 3 drametoj kaj 5 eseoj de 31 aŭtoroj el 14 landoj. La rezultoj estis jenaj:

POEZIO: 1. **Eduard V. Tvarožek** (Ĉeĥoslovakio) por "Sola en sunsubiro"; 2. egale al **Albert Goodheir** (Skotlando) por "Printempaj strofoj" kaj **Vesna Skaljer-Race** (Jugoslavio) por "La manoj de l'homo"; 3. **Vesna Skaljer-Race** (Jugoslavio) por "Turniĝas la rado de l'historio".

PROZO: 1. **Endre Tóth** (Hungarujo) por "Lappar, la Antikristo"; 2. **Endre Tóth** (Hungarujo) por "La murdita juglandarbo"; 3. **Karolo Pič** (Ĉeĥoslovakio) por "Ne lasu min ĉi tie, patro". La premio "Luigi Minnaja" por originala eseo: **Karolo Pič** (Ĉeĥoslovakio) por "La interna sistemo de Esperanto".

DRAMO: 1. Ne aljuĝita. 2. Ne aljuĝita. 3. **Alexander R. Mollison** (Skotlando) por "Kongres-hotelo".

PREMIO HARABAĜIU por NOVA TALENTO: **Bernard Golden** (Hungarujo) por "Tropika festeno".

FOTOGRAFIO: Konkursis 13 aŭtoroj per 46 foto-grafaĵoj; la premioj estis jene disdividitaj: 1. **Zoltán Fejér** (Hungarujo) por la foto de K. Kalocsay (kiu jam aperis en nia aprila numero, p.65). 2. **Bernard Golden** (Hungarujo) por la fotografaĵo "Daniel kaj la leonoj". 3. **Leila Kantonen** (Finnlando) por foto sen titolo. Laŭda mencio: **Zoltán Fejér** (Hungarujo) por la foto "Infanoj".

Prioritato al la originala literaturo

Por la unua fojo, nur verkoj originale verkitaj en Esperanto estis akceptataj ĉe la Konkursoj. Post la Kopenhaga Kongreso la Komisiono pri la Belartaj Konkursoj anoncis, ke provizore estas forigitaj la tradukaj branĉoj de la Konkursoj pro la longe spertitaj praktikaj malfacilaĵoj por justa prijuĝo de verkoj tradukitaj el lingvoj ne konataj de la komisionanoj. Fakte, el la tri tradukaj branĉoj – poezio, prozo kaj teatraĵo – nur unu – poezio – efektive funkciis en la pasinteco. Tiu decido signifas, ke la branĉoj originalliteraturaj: originala poezio, originala prozo kaj originala dramo ricevas rangon ekskluzivan, kiel estas kutime ĉe similaj konkursoj nacilingvaj.

Lige al tiu ĉi optimisme fidema emfazo sur la original-literaturon estis anoncita por tiu ĉi jaro nova branĉo de originala eseo sub aparta titolo: **Premio Luigi Minnaja**. Laŭ interkonsento kun la familio Minnaja (Italujo), kiu donacis la kapitalon por la premio, temu pri

eseoj lingvaj, literaturaj aŭ sociologiaj, prefere en ligo kun Esperanto kaj ĝia uzado. Estas bonaŭgure, ke la unuaj konkursoj en tiu ĉi nova branĉo estas ĝenerale de alta kvalito, kio pruvas, ke oni rigardas tiun novan konkurseblecon kun bonveniga seriozo.

Estas interese rimarki, ke la nombro de poeziaj kaj precipe novelaj konkursoj por tiu ĉi jaro estas konsiderinde pli alta ol ĉe la originalaj branĉoj lastjare.



Proklamo de la rezultoj de la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj: **V. Benczik** (maldekstre) kaj **B. Ragnarsson** aplaŭdas al **Vesna Skaljer-Race**, kiu legas siajn premiitajn poemojn.

Ankaŭ la kvalito estas ĝenerale pli bona, precipe en la prozo. Ĉu oni jam rajtas tiri el tio iajn konkludojn, estas eble dubinde; tamen, mi emas vidi en la nova aranĝo ĝuste tian konsistigon, kia estas absolute necesa por doni al la Konkursoj pli da altira kohereco ol ili havis ĝis nun. Varieco estas bona, sed pli bona estas varieco, kiu samtempe formas integran tutaron, kiu nature kreskigas sin per sia propra altirpovo. La bel-literatura tradukado estas ja gravega, sed mia opinio estas jam provende, ĉu ne estos pli praktike konkursigi pri ĝi en malpli vastaj kadroj ol estas la Belartaj Konkursoj. Proponoj pri kontentiga solvo de la traduk-konkursita problemoj estas jam konsiderataj en la Komisiono de la Belartaj Konkursoj, kio tamen ne signifas, ke ĝi arogas al si prezenti pri tio ion definitivan. Estas nur nature, ke precipe la landaj asocioj okupu sin pri tiu problemoj, ĉar finfine estas ja ilia tasko i.a. stimuli kaj subteni la tradukadon de nacilingvaj tekstoj, ĉiu en

sia sfero. Ĉu UEA ankaŭ tie povos iel eniri la bildon, eble aŭspicie, tio estas tamen imagebla kaj esplorinda.

Komentoj pri unuopaj branĉoj

Poezio: Nombro de konkursaĵoj: 27 (lastjare 22). La poezio akiris meznombro 33 poentojn por konkursaĵo el la eblaj 60 (lastjare 29). Malgraŭ kelkpoenta plialtiĝo oni apenaŭ povas diri, ke la kvalito estas rimarkinda. Laŭ unu el la juĝintoj la poezia materialo nepre atestas pri krizo en nia liriko, samkiel estas konstateble ĉe la nacilingvaj poezioj; aliaj juĝintoj tamen malpli severe komentis. Mia propra opinio estas, ke kelka anemio estas ja konstatebla ĉe la pli multaj konkursaĵoj kaj manko de tia nepreco, kiu pli ol io alia igas poemon aŭtentika al leganto. Certe, tamen, la aludita juĝinto grandparte pravas dirante, ke laŭ la nuntempa kritiko la poezio ne plu estas komunikilo adekvata al la tempoj. Eble la valo, en kiu nun verŝajne trovas sin nia poezio, povas esti interpretata tiel, ke niaj verkistoj jam konsideras turni sin prefere al prozo kiel pli taŭga esprimilo. Aŭ, ĉu eble estas necese renovigi postulojn pri pli da severeco forme kaj esprime en la poezia arto por relevi ĝin al pli respektata pozicio? Ĉu eble ni simple bezonas novan, plivastigitan Gvidlibron Parnasan?

Prozo: Nombro de konkursaĵoj: 26 (lastjare 16). La prozo akiris meznombro 35 poentojn por konkursaĵo el la eblaj 60. Tio estas konsiderinde pli bona rezulto ol lastjare, kiam la meznombra poentaro por prozo estis 29. Oni do povas diri, ke la unua kaj plej agrabla impreso estas la plimultiĝo kaj la akompana kvalita pliboniĝo de la konkursaĵoj. Pli da varieco en temelekto estas ankaŭ konstatebla, la konkursantoj pli sukcese ol lastjare klopodas eviti "grandajn" temojn, bazitajn sur nebulaj filozofioj kaj ŝvebantaj ideoj; eĉ, ĉe prilaboro de tiaj temoj ili klopodis verki pli konkrete kaj ne ŝuti senpere siajn mondsavajn pensojn al la legantoj, kiel mencias kurtatone unu el la juĝintoj. Tamen, bedaŭrinde, troa subjektiveco daŭre regas en multaj verkaĵoj; oni volas atingi aŭtentikecon per rakontado de aferoj, kiuj okazis al "mi". El la 26 noveloj 14 verkigis en "mi"-formo, do, en la unua persono de singularo, kaj uzante tiun teknikon la konkurantoj sentas sin rajtigataj verki sen sufiĉa respekto al la teknikaj, metiaj postuloj. Bonaĵo estas, ke la stilo ĝenerale fariĝis pli konkreta, malpli poezieca, do, entute pli proza, kiel decas. Atentinda fakto estas la daŭra ĉeesto de malkorektaj formoj en relative multaj konkursaĵoj, inkluzive de bonaj verkoj. Ŝajnas konsilinde, ke konkursantoj petu tralegon de siaj verkaĵoj fare de spertaj esperantistoj el gramatika kaj stila vidpunktoj antaŭ ilia enkonkursigo. Fine mi volas atentigi pri tio, ke sukceso eblas en tiu ĉi konkurso nur per noveloj aŭ rakontoj adekvate ellaboritaj, tute ne per skizoj, felietonaĵoj, aŭ duoneseoj. Por bona novelo necesas ne nur ideo, sed ankaŭ zorga laborado.

Dramo: Nombro: 3 (lastjare 7). La kvanta malkresko certe ŝuldiĝas antaŭ ĉio al la preskaŭa neeblo de sceneja prezento. Ŝajnas jam tempo por UEA serioze esp-

BELARTAJ KONKURSOJ 1976

Originala poezio

Unua premio:

Sola en sunsubiro

Se dum la sunsubiro
vin ekkaptas la sento de soleco
naskiĝas en la animo deziroj
pri io nekonata
aŭ konata aliel
sopiroj
pri la ripetiĝo de la pasinteco
sed pli bona
pli inda
pli profunda

por povi droni en ĝi
por ekscii ĉu jam estas fino
aŭ ĉu ne tute ankoraŭ
ĉu ankoraŭ ĉiam
havas valoron la samo
kio valoris iam

Tiuj esperoj kaj deziroj
oromitaj de la sunsubiro
forbrulas en ties orsangaj flamoj
kaj gravas nur tio
ĉu vi kapablas
post la lasta alrigardo
fermi la okulojn
kaj kapti la sunsubiron en ili
Se jes
povas veni la fino
ĉar vi portas malantaŭ viaj lidoj
la vivan bildon de viaj esperoj
brilantaj en la fajro de la renovigo
Subite vi eksentas
ke viaj sopiroj estas realeco
kaj ĝis la lasta momento
vi ripetas al vi:

Ĝi estas belega



Eduard V. Tvarožek

lori eventualajn eblecojn prezenti almenaŭ unuapremiajn drametojn regule en la kongresoj kaj tiel konkrete evoluigi tiun ĉi artbranĉon konforme al la Regularo. Dramoj ekzistas por esti ludataj sur scenejo, nenia klopodo por tion efektivi en nia kazo nepre reduktos la partoprenon en la drama branĉo ĝis minimumo kaj eventuala ĉesigo.

Eseo: Mi jam menciis, ke la eseaj konkursaĵoj por tiu ĉi unua fojo estis vere altkvalitaj. La konservataj komentoj de la juĝintoj: Reto Rossetti, Ebbe Vilborg kaj Richard Wood klare tion atestas. Ĉiuj eseoj rikoltis laŭdojn (sed ja ankaŭ diversajn malpli gravajn kritikojn) kaj certe estas ĉiuj aperigindaj kiel valoraj, eĉ tre valoraj kontribuoj al la sferoj indikataj en la konkursa formulo. Estas feliĉige, ke la konkurso por la Premio Luigi Minnaja tiel eminente sukcesis jam en la

erizas sobra seriozeco de celo, digneco, logika organizo kaj relativa longeco. Certe la eseo kiel nuna konkursbranĉo en la Belartaj Konkursoj apartenas al tiu ĉi kategorio. La formala eseo grandparte formiĝadis sur la kampo de kritikaj periodaĵoj, precipe anglaj, en la lasta jarcento. Tiam fariĝis kutimo verki librorecenzojn en la formo de longaj kritikaj eseoj, kutimo, kiu ankoraŭ estas vaste aplikata. La maniero de la formala eseo aperas ankaŭ en multaj aliaj verkoj de famaj prozistoj de la lasta jarcento, ekzemple ĉe Carlyle, Ruskin kaj Kardinalo Newman, kaj tiam en traktado de temoj historiaj, biografiaj, sciencaj, edukaj, religiaj kaj etikaj. En nia tempo la formala eseo, anstataŭ kristaliĝi en difinitan literaturan ĝenron, tendencis diversiĝi en formo, spirito kaj longeco konforme al la temo kaj serioza celo de la aŭtoro. Unuekstreme ĝi reprezent-

BELARTAJ KONKURSOJ 1976

Originala poezio

Dua premio (en egaleco):

La manoj de l'homo

Mi aŭdis singultojn,
jubilojn de violono,
petolanta
en la manoj de homo.

Mi vidis miraklojn
de l'fora kosmo,
enigmon kaj solvon
en la manoj de homo.

Mi observis akvojn —
estis kvazaŭ fantomo —
ili iĝis urboj, floroj
en la manoj de homo.

Mi admiras la manojn de l'homo.

Mi vidis geviojn
mortantajn pro malsato,
eĉ idojn iliajn.

Kadavrigadis ilin
kun penso trankvila,
en kvieto senzorga,
per manoj senmovaj —
homo.

Mi vidis korpojn
sen gambo, sen brako,
vizaĝojn sen vido.
Prirabis ilin
per longfingraj manoj siaj
homo.

Mi timas la manojn de l'homo.

Vesna Skaljer-Race

komenco, kaj mi volas esprimi al la familio Minnaja la plej varmajn dankojn kaj gratulojn pro la valora iniciato koncerne tiun ĉi novan konkursbranĉon.

Mi opinias tion konvena, fine de mia raporto, dediĉi kelkajn liniojn al mallonga disparto pri la ĝenro **eseo**, se nur por substreki la gravecon de ĝia enkonduko en la Belartajn Konkursojn. En la *Plena Ilustrita Vortaro* oni povas legi, ke la eseo estas "mallonga literatura verko, en kiu la aŭtoro ne intencas funde pritrakti sian temon". Se iu trovas tiun difinon ne tre helpa, oni devas konsideri, ke pro la vasta aplikado de la termino "eseo" nenia plene kontentiga difino estas ebla; nek ekzistas tute akceptebla klasifiko de eseaj tipoj. Tamen, baza kaj tre utila divido estas ebla: la **formala eseo** kaj la **neformala eseo**. La neformalan eseon karakterizas antaŭ ĉio la **persona** elemento, t.e. memriveligo, individuaj gustoj kaj spertoj kaj aŭtoro konfidemo kaj humoro, la stilo estas malrigida kaj gracia, la strukturo iom disvagama, la temelekto originala kaj nekonvencia kaj la tempritrakto nekompleta aŭ eĉ eksperimenta. La difino en *PIV* supozeble rilatas prefere al tiu ĉi kategorio de eseoj. La formalan eseon, kontraŭe, karakt-

iĝas per la mallonga, serioza, periodaĵa artikolo, aliekstreme per sciencaj kaj filozofiaj traktaĵoj, kiuj pli estas tutaj libroj ol eseoj. La tekniko de la formala eseo estas nun praktike identa kun tiu de ĉia prifakta aŭ priteoria prozo, kie literatura efikeco estas duavica al la serioza celo.

En Esperanto la arto de la eseo plejparte manifestiĝis sur la kampoj de la literatura kritiko kaj beleto, kie plej eminentas la libroj de prof. G. Waringhien: *Eseoj* kaj *Lingvo kaj vivo*. Multaj el la aperigitaj prelegoj ĉe la Internacia Somera Universitato ankaŭ povas esti konsiderataj kiel formalaj eseoj. Ekde nun la formala eseo estos regula parto de la proza branĉo en la Belartaj Konkursoj de UEA. Espereble tiu decido havos plivigligan efikon sur la tro malrapidan kaj eventomagran evoluon de nia prozo. Samtempe oni povas esperi, ke baldaŭ estos loko ankaŭ por la neformala eseo en la kadro de la BK. Ni ankaŭ bezonas eseajn pritraktojn de la malpli seriozaj flankoj de la vivo, disvagemajn eksperimentojn prozajn, personajn temperamentaĵojn kaj humuraĵojn por plidiversigi nian literaturan tradicion.

Baldur Ragnarsson

Kial ne grekaĵo?

TEATRAJ PREZENTADOJ ĉiam estis rigardataj — aŭ almenaŭ devus esti rigardataj — kiel unu el la ĉefaj programeroj de la Universalaj Kongresoj; ili ja prezentas la solan vere seriozan eblecon por la Esperanta parola arto. Kongresa teatra prezentado ankaŭ estas la sola okazo, kiam optimisma originala dramisto povas esperi vidi sur scenejo la figurojn kreitajn de li.



Bulgara Esperanto-Teatro en Ateno: Kongresanoj bone ĝuis la spektaklon kaj foriris kontentaj.

Sed nur teorie. Pasis jam longaj jaroj sen vidi sur la kongresteatra scenejo ion ajn originale verkitan en Esperanto, kaj efektive pro tio mi ne kuraĝas riproĉi tiujn malmultajn teatristojn kiujn ni havas, ĉar la Esperanta drama literaturo estas kaj kvante kaj kvalite magra. Tamen, volonte la publiko iam vidus sur scenejo ekzemple la verkon *Songe sub pomarbo*, aŭ eĉ, la iaman tre amuzan kongresfonan kriminalan komedion de Johnson: *Levu la manojn!*

Malgraŭ ĉi tiuj amaraĵoj, mi povas kompreni la decidon de la Bulgara Esperanto-Teatro ne riski tutjaran laboron. S-ro Draĵev do denove ĉerpis el la nacilingvaj dramaturgioj, ankaŭ ĉi-foje denove el la franca. Kaj, ĝuste tiun decidon mi nepre volus diskuti. Antaŭ ol forveturi al la Kongreso, mi tralegis la Esperantajn tradukojn de la du famaj verkoj de Sofoklo: *Antigona* kaj *Reĝo Edipo*, kaj mi devis konstati, ke la tradukoj taŭgas por scenejo. Kial oni ne elektis iun grekaĵon, se oni ĉiukaze jam volis prezenti ion el la nacilingvaj dramaturgioj?

Sed, sufiĉas jam la demandoj pri kio ne okazis! La ĉeestantoj de la 61a UK povis ĝui tre bonan teatran prezentadon de *Lernejo de virinoj* de la franca klasik-

ulo Molière (1622 - 1673). Estis tre agrable vidi la ek-timon de la homoj ĉe la komenco ne trovi sidlokon en la agrabla teatro Lusitania de Ateno: tio ja atestas, ke la plimulto de nia publiko ŝatas kulturon, kaj teatraj prezentadoj estas digesteblaj ankaŭ por tiuj homoj, kiuj ne volonte legas librojn. El la milkapa publiko forlasis la teatron dum la paŭzo nur kelkdeko da personoj.

La prezentado mem estis de profesia nivelo, kio ne estas mirinda afero, ĉar BET ja konsistas el profesiuloj. Por mi, kiu la unuan fojon vidis kaj aŭdis la trupon, estis aparta surprizo la bona prononco de la geaktoroj. Ili ĉiuj parolis fluan, tamen klaran Esperanton, kaj dank' al la lerta traduko de K. Draĵev spektantoj tute ne devis rompi al si la kapon por kompreni ion, krom tiuj, kiuj sidis malantaŭe kaj suferis iomete pro la mal-bona akustiko, kio ŝuldiĝis al la plafono, kiu estis malfermita ĉe la meza parto.

La reĝisoro M. Mindov interpretis la verkon laŭ la tradicia maniero, evitante ĉian modernan ekstravaganc-on, kio estas pravigebla koncepto kiam oni ludas antaŭ publiko tre diversa. Tamen, mi mem volonte vidus iaspecan — eble eĉ amuze anakronisman — modernigon de la verko, kvankam tio verŝajne ŝokus plurajn homojn, i.a. feministojn.

Efektive, la prezentado ne donis eblecon brili al iuj aktoroj. La tuto estis regata de la reĝisoro, kio certigis unuecon kaj koherecon de la prezentaĵo. Krom tio, atentindaj karakterizoj estis ankoraŭ la disciplinemo kaj modereco. Ĉiuj ĉi faktoroj ebligis, ke grandega plimulto de la kongresanoj bone ĝuis la prezentadon kaj foriris kontenta, tamen, ne en humoro multe impresita aŭ diskutema.

Vilmos Benczik

Potenca bulgara koruso

ANSTATAŬ la atendita pupteatra prezentaĵo, kiu ne okazis pro la maleblo de bulgara pupteatro el Sliven atingi Atenon, dimanĉon, la 1-an de aŭgusto, estis improvizita aparta aranĝo en kiu prezentiĝis japana dancistino Rie Anzai kaj bulgara koruso el Târgoviște.

Montriĝis, ke tio tamen estis unu el la plej sukcesaj artaj aranĝoj de la Kongreso. Pri la dancarto de Rie Anzai, B. Ragnarsson en "Kongresa kuriero" skribis jenon: "La japanajn dancojn karakterizis delikata precizeco kaj ekvilibra stilo kun profunde emocia valoro. La malrapidaj, alte simbolaj movoj pensigis pri pentroarto — sinsekvaj, vivantaj 'pentraĵoj' sin disvolvadis en plenkontrola trankvileco." La unuan parton de ĉi tiu aranĝo kompletigis delikata ludo de Hirojo Eguĉi sur la japana kordinstrumento ŝamiseno. La dua parto de la vespero iel sukcesis kateni la potencon okdek-personan koruson el Bulgario. Eble ĝuste ĝia duonhoru estis la arta pinto de la tuta Kongreso, kvankam ĝi koncertis en ekstreme

Japana dancistino Rie Anzai en Ateno (en la fono estas s-ino Yukiko Isobe, kiu gvidis la programon): Ni ofte vidis japanajn dancojn en la Kongresoj, sed ni malofte havis tiel kompetentan artistinon kia montriĝis R. Anzai.



nekonvena ejo, en kiu mankis eĉ fortepiano. La koruso kantis bulgarajn kaj grekajn melodiojn, plurajn el ili en perfekta Esperanto. Restas por miri ke tiu altkvalita ensemblo, tiom multnombra, venis al Ateno nur pro tiu duonhoru, aŭ: ĉu tio estis nur antaŭanonco de ĝia tutvespera koncerto en Varna post du jaroj?

GREKA VESPERO:

Perfekteco kiel manko

LA ĈI-JARA KONGRESLANDO apartenas al tiuj mondpartoj en kiuj la folkloro arto ne estas muzeaĵo, sed ĝi ankoraŭ dense plektiĝas kun la ĉiutaga nuntempa vivo. Tial ne ekzistis pli bona alternativo, ol elekti grekan folkloron por la kutima kongresa programero en kiu la gastiganta lando prezentiĝas al la kongresanaro. Plia trafo estis decidiĝi pri la ensemblo kaj teatro de Dora Stratu, ĉar tio donis al la spektantoj privilegian okazon konatiĝi kun ĉi tiu legendiĝinta damo de la greka kaj internacia folkloroj. Plimulto de la kongresanoj povis (simile al Beograd en 1973) malkovri la verajn sencojn de la nocio folkloro kaj arto kiun ĝi etikedas. Tial la programo de la Greka Vespero impresis la plimulton de la spektantoj eĉ pli multe ol ĝi efektive valoras. Por ke oni ne miskomprenu nian aludon, necesas diri, ke la sola manko de la ensemblo de Dora Stratu estas ĝia perfekteco, ĝia troa perfekteco, tiel ke ĝi kelkloke impresas pli artisme ol arte, pli cirke ol dance. Verŝajne, por inicitoj tio estis plej evidenta ĉe la kostumoj (tro da ruĝkoloraj ŝuoj, zipitaj pantalonoj, troaj ŝu-tufoj). Estas bedaŭrinde, ke Dora Stratu mem ne havis komunan lingvon por gvidi la spektantojn tra sia spektaklo, des pli ke la esperantlingva prezentado lamiĝis lingve kaj informe. Oni vidis dancojn kaj aŭdis kantojn el Makedonio, Ipiros, Dodekaniso, Pontos, Kato-Panaja (Malgranda Azio)

kaj Rumeli-Morias. Montriĝas maleble elstarigi la plej plaĉan el ili, ĉar ĉiuj estis prezentitaj kun profesia virtuozece de la plej alta rango. Al la sukceso de la spektaklo grave kontribuis ankaŭ la fakto, ke ĝi estis la sola kongresa programero kiu okazis en la ĝusta ejo, t.e. sub aŭgusta atena firmamento, en liberaera teatro "Dora Stratu", kun rigardo al la feste lumigita Akropolo.

sm

INTERNACIA ARTA VESPERO:

William Auld k.a.

LA KONGRESA KONCERTO, en kion dum kelkaj lastaj jaroj celis transformiĝi la Internacia Arta Vespero, ne estis tre koncerteca en Ateno. La Vesperon stampis ne tro vaste konataj (kvankam konendaj) talentoj de la poeto William Auld. Jam en Portlando en 1972, gvidante similan kongresan vesperon, Auld trudiĝis kiel la plej lerta programprezentanto kiun la movado konas, kaj unu jaron pli frue, dum la UK en Londono, li re-pruvis siajn aktore deklamajn kvalitojn. Sen Auld la Internacia Arta Vespero en Ateno similus al amorfa kantobulo de pli malpli konataj kantoj kaj kantistoj. Lia lerta gvidado de la programo sukcesis iom vuali la kantistojn, kiuj evidente ne estis en sia plej bona "el-dono" (Margaret Hill, Jordan Karaĝosov kaj Maria Angelova). En tiu unua parto de la programo — pri kiu ni parolas — elstaris Veselin Damjanov, kies atena prezentiĝo estis lia plej granda sukceso ĝis nun. Preskaŭ malfacilas kredi, ke tiu atena Damjanov (kies voĉo multoble superas liajn komponistajn kapablojn) estas la sama kantisto kiu programis ankaŭ en Hamburgo kaj Kopenhago.

La bulgara aktorino Belka Beleva aperis kiel sukcesa interludo inter la du partoj de la Vespero. Ŝi potence monologis Medea-n de Eŭripido, tragike kaj eŭripidece, sed ne tro medeece.

La dua parto de la Vespero estis omaĝo al Kalocsay. Kvankam ĝi eble ne celis tion, ĝi ĉefe prezentis la malpli konatan Kalocsay (liaj kantotradukoj kaj eĉ liaj komponaĵoj). Auld brilis per monologo el *Reĝo Lear* kaj bone deklamis fragmenton el "Ahasvero de amo" (kvankam malfacilas konjekti kial li elektis tiun pecon) kaj tradukon "Ho, teda pens'" de Petöfi. Sed, oni ĝenerale ne atendu multon kiam poetoj mem deklamas siajn poemojn: "La torĉportinto" (v. nian martan numeron p. 46).

La publiko, kiu plenigis la 1000-seĝan teatron, denove montriĝis grandanima kaj dankema. Ĝi tiel malofte havas okazon ĝui artajn spektaklojn en la Internacia Lingvo, ke tio ne eviteble vundas ĝiajn eventualajn kritikajn postulojn pri nivelo. Tamen, estonte, necesos zorgi, ke la publiko havu ĝuokrediton ĉe la artistoj, anstataŭ ke la artistoj kunportu aplaŭdo-krediton de la publiko, kiel okazis en Ateno.

sm



La 61an UK en Ateno honoris per sia ĉeesto ankaŭ prof. Gaston Waringhien, prezidanto de la Akademio kaj Honora Membro de UEA, festinte nur dekon da tagoj antaŭ la Kongreso sian 75-jariĝon (v. nian junian numeron, p.113). Restas dubinde, ĉu la troŝtopita programo de la kongresa semajno donis al la prezidantoj de la Akademio kaj de UEA alian eblecon interŝanĝi opiniojn, krom ĉi tiu "kun-sideto" dum la akcepto en la Urbodomo de Ateno.

Hasto kaj kosto

HAZARDE ĉi tiu paĝo estas la laste prilaborita ero de ĉi tiu numero de la revuo. Estus siaspeca rekordo, se ni estus povintaj konstati, ke malgraŭ la tuta hasto en kiu pretiĝis la numero, ĉiuj temoj estas elĉerpitaj kaj la tuta kosmece komplika kongresa programo plene priraportita. Male okazis. La hasto havas sian koston: La numero post kelkaj horoj iros en la presmaŝinojn, kvankam tuta aro da kongresaj programeroj ne sukcesis elbatali linieton en ĉi tiuj paĝoj. Kelkajn el la ĉi tie ne tuŝitaj temoj ni intence lasis flanken por poste reveni al ili trankvile kaj detale. Tio aparte koncernas la sukcesan pritrakton de la dua kongresa temo "Kiel nuntempe argumenti por Esperanto", la gravajn kun-sidojn (tri entute) pri la plua evoluo de CED, kunvenojn pri la virina agado, kulturo, eksteraj rilatoj, parlamenta agado kaj la tuta labirinto de la fakaj kunvenoj dum la Kongreso. Al la plimulto de tiuj temoj ni revenos en nia oktobra kaj postaj numeroj.

Se ĉiu hasto havas sian koston, tiam ankaŭ ĉiu kosto devus havi sian gajnon. Nia (aŭ pli bone: via) gajno estas la ĝustatempa apero de ĉi tiu revunumero.

Plia kontribuo al la faka literaturo

LA 29a SESIO de la Internacia Somera Universitato ampleksis 15 prelegojn, el kio la kvar prelegoj de J.C. Wells konsistigis apartan seminarion pri "Esperanto kaj lingvistiko". Tiu prelegserio vekis vere nekutiman interesigon ĉe la kongresanaro kaj la legantojn certe interesos la novaĵo, ke Centro de Esploro kaj Dokumentado baldaŭ aperigos tiujn kvar prelegojn en aparta libro.

Ankaŭ la aliaj prelegoj de ĉi tiu sesio, kies rektoro estis prof. Vasil Peevski, logis al la prelegsalonoj kelkajn centojn da kongresanoj. Al tio grandparte kontribuis la varieco de la temoj traktitaj en la atena sesio de ISU. Ni verŝajne plej bone prezentos tiun variecon, se ni listigos la titolojn de la prelegoj: William Auld tiel interese traktis la temon "Lingvo kaj kulturo", ke ni klopodos havigi al ni la tekston por posta publikigo en la revuo; Belka Beleva parolis pri "La teatra parolformo", tereno kiun oni apenaŭ ekesploris lige al la Internacia Lingvo; sepdekon da kongresanoj interesis la temo de Werner Bormann "Entiriĝo de kulturpolitiko en nur ekonomian integriĝon"; Michel Duc Goninaz, unu el la organizantoj de ISU, prezentis la temon "La terminoj de alparolo kiel socilingvistika problemo"; iom malpli ol cent kongresanoj sekvis la prelegon de Helmar Frank "Kibernetiko kaj homa lernado"; Sin'itirō Kawamura parolis pri "Originoj de la vivo"; Jonathon Pool en sia prelego okupiĝis pri "Lingvo kaj identeco"; Baldur Ragnarsson renkonte al la venontjara UK prezentis la temon "La pozicio de la islanda literaturo en la literaturo monda"; ankaŭ Miodrag Stojanović traktis literaturan temon "Grekaj popolaj kantoj en la traduko serba"; Carl Støp-Bowitz okupiĝis pri la demando "Kial kelkfoje maraj moluskoj fariĝas venenaj"; Alois Wenclewski venis al Ateno el Zairio por prelegi pri la temo "Ĝenerala superrigardo je la vitaminoj". La anoncita prelego de István Szerdahelyi ne okazis pro lia maleblo veni al la Kongreso.

De jaro al jaro restas por bedaŭri, ke la valora faka literaturo, kiun konsistigas la prelegoj en la Internacia Somera Universitato, restas nur parte alireblaj (nur aŭskulte) al la interesitaj partoprenantoj de la koncerna Universala Kongreso. Jam delonge estas tempo, ke oni ne nur lasu la demandon al bontrovo aŭ revuspaca dispono de la redaktoroj, sed ke oni faru organizitajn klopodojn disponigi la prelegaron de ISU al pli vasta publiko.

Tesaloniko: Unu el la plej grandaj IJK

DUM LA 61a UK EN ATENO apartenis al la mez-grandaj kongresoj en la historio de UEA, la 32a Internacia Junulara Kongreso de TEJO estis unu el la plej amase partoprenitaj aranĝoj de la junulara sekcio de la Asocio: ĉeestis ĝin 350 junaj esperantistoj, kaj tiun ciferon superis nur la 22a IJK en Pécs (Hungario) antaŭ dek jaroj.

La Studenta Domo de la Aristotela Universitato en Tesaloniko servis dum unu semajno antaŭ la UK kiel hejmo de la esperantista junularo. Kaj efektive ĝi estis vera hejmo: la kongresanaro, loĝigita en tri tuj-apudaj konstruaĵoj, ĝuis plenan komforton, iom nekutiman dum IJK-oj: ĉiuj manĝoj kaj programeroj okazis en la tri konstruaĵoj kaj ... ĉiu kongresano loĝis en unulita ĉambro! Apud tiaj pozitivaj, la kelkfoja malfunkciado de la liftoj kaj la ne tro allogaj kaj monotonaĵoj vespermanĝoj — la ceteraj manĝoj estis tamen bonaj — ne kaŭzis kapdolorojn al Savas Tsiturides, prezidanto de LKK, konsistanta preskaŭ nur el atenananoj!

Tiaj fizikaj cirkonstancoj jam duone garantias la sukceson de la kultura kaj labora partoj de iu ajn aranĝo. Kaj la kongresanoj efektive ne povis plendi: riĉa programo atendis tiujn, kiuj preferis la iom striktajn kaj organizitajn programerojn al la spontaneaj grupaj diskutoj aŭ ĉekafa babilado. Kun modela akurateco kaj reguleco funkciis ekzemple la laborgrupo "Komputero kaj programado", kaj ankaŭ la lingvokurso, gvidita de Jim Cushing. Kompreneble, tiuj ĉi organizitaj grupoj ne malpliigis la emon por spontaneaj diskutoj: la subskribinto de tiu ĉi raporto foje mem partoprenis tian en dekkapa grupo antaŭ la studenta hejmo ... ĝis la kvara horo matene! Sed la bufedo de la Studenta Domo plenis per babilemuloj je ĉiu horo, kiuj probable ek-timis la minacan afiŝon, metitan tie de ŝercemulo: "Ne-interkonatiĝemuloj estos mortpafitaj kaj poste forte riproĉitaj!"

Estis aparte riĉa kaj vastgama la prelega programo de la Kongreso, kaj la ĉeestantoj pruveble ŝatis tion, ĉar ĉiuj prelegoj ĝuis respektindan vizitatecon. Takasi Saguĉi prelegis pri la japana agrikulturo; Savas Tsiturides konigis al la ĉeestantoj la historion kaj vidindaĵojn de Tesaloniko; J. Felĥter el Israelo pritraktis la temon: "Kuracistoj en la familio Zamenhof"; Luis Soroniatas prelegis pri grandulo de la greka kulturo, Nikos Kazantzakis. Aktualegan temon tuŝis la prelegoj de Claude Nourmont-Moon kaj Humphrey R. Tonkin, kiuj ambaŭ ekzamenis la rolon de la lingvo en la socio. Tonkin donis aparte grandan atenton al la specifa fenomeno de la "esperantista socio", kaj lanĉis la interesan de-


mandon: kiuj sociaj kaj ĉefe psikaj elementoj kontribuas al ies decido fariĝi kaj precipe **resti** esperantisto? Estis riĉa — almenaŭ kvante — ankaŭ la kultura programaro de la 32a IJK, kvankam ĉiuj partoprenantoj ege bedaŭris pro la neokazo de la pupteatra prezentado de "La eta princo". La teatra vespero eĉ krom tio iom malriĉiĝis: pro nekonata kialo la Drama Sekcio de la Studenta Esperanto-Klubo el Zagreb (Jugoslavio) ne prezentis la antaŭanoncitan teatraĵon de Arturo Azevedo: "Amo per proverboj", kaj la ĉeestantoj devis kontentiĝi pri la multfoje viditaj "La morto de Lia Ekscelenco" de M. Matkoviĉ kaj "Analfabeto" de B. Nuŝiĉ. En la unua verko impresis la spektantojn ĉefe Mladen Ŝerment, dum en la dua elstaris la sencere-monie amuza ludo de Zlatko Tiŝljariĉ.



La Estraro de TEJO ne bezonas kunsidsalonon: Oni simple sidiĝas ĉe vojrando kaj — jen kunsido! De maldekstre: C. Nourmont, J. Sly, M. Korniluk kaj T. Vasko.

La Greka Vespero donis al la kongresanaro ĝuste tion, kion ĝi atendis: fajrerantajn dancojn kaj kantojn, buntajn, okulallogajn kostumojn kaj veran grekan etoson. Varmaj, longaj aplaŭdoj pruvis la sukceson de la prezentado.

Ne tiel sendiskuta estis la sukceso de la Internacia Arta Vespero, kies nivelo estis ege ondanta, malegala, kvankam pri la entuziasmo kaj aktiveco de la rolantoj oni ne povis plendi: ne sufiĉis unu vespero por prezenti la tutan proponitan programon. Evidentiĝis, ke la plimulto de la rolantoj ne bone konsciis pri la iasence limigitaj eblecoj, kiujn prezentas grandega salono (kaj konstante misfunkciantaj laŭtigaj aparatoj) kaj prezentis lirikajn popolkantojn, kiuj en pli intima medio efikus agrable, sed ĉi tie ili tedis la spektantojn. Estonte necesos iom pli forta reĝisorado por similaj aranĝoj.



Verŝajne estas frenezige samtempe prezidi en LKK de la junulara kongreso kaj sekretarii en LKK de la UK. Tion tamen sukcese faris d-ro Savas Tsiturides, psikiatro.

Plej elstara punkto inter la distraj programeroj de la Kongreso estis la merkreda ekskurso al Halkidiki. La belega pejzaĝo, la diafane pura marakvo kaj la etoso faris tiun ĉi tagon eble la plej memorinda dum la tuta semajno. Kaj, ĉar la vespero de tiu ĉi tago estis libera, multaj iris al la urbo por ĝui grekajn manĝojn kaj vinojn en agrablaj marbordaj restoracioj.

Kompreneble, okazis dum la semajno ankaŭ la rutinaj oficialaj aranĝoj. La inaŭguron partoprenis pluraj reprezentantoj de diversaj grekaj instancoj. Fine de la semajno, la Ministro por la Norda Greklando donis akcepton por ĉiuj partoprenantoj en la hotelo "Elektra Palaco". La Komitato kaj Estraro de TEJO havis dum la semajno — ĉu pro la inspiro de la loko? — maratone longajn kunsidojn, dum kiuj estis elektita ankaŭ nova Estraro: prezidantino: Claude Nourmont-Moon (Francio), vicprezidantoj kaj regiona agado: Savas Tsiturides (Greklando), Tibor Vasko (Hungario), ĝenerala sekretario: Brunetto Casini (Italio), sekretario de la komitato: Rita Krips (Germana D.R.), studenta agado: Walter Żelazny (Pollando), lerneja agado: Mirosława Korniluk (Pollando), presajoj: Stefan MacGill (Nov-Zelando/Nederlando), varbado: Paul Peeraerts (Belgio), KER: Janet Sly (Britio), kongresoj: Klaus Schubert (F.R. Germanio).

Estis akceptitaj du kongresaj resolucioj, el kiuj la unua tuŝis la rolon de la lingvo en la socio, dum la dua certigis pri la apogo de TEJO al la lukto de minacataj lingvoj kaj kulturoj; krome, la Kongreso traktis la Finan Dokumenton de la Eŭropa Junulara kaj Studenta Asembleo.

Sabaton antaŭtagmeze (la 31an de aŭgusto), post iom maldense partoprenita oficiala fermo, ĉiuj disiĝis. Iuj veturis al Ateno, por ĝui plian semajnon en internacia medio, dum aliaj reiris hejmen, kaj ilin eblos renkonti nur venontjare en Poitiers (Francio), kie — anstataŭ en Islando — okazos la 33a IJK.

V. Benczik

TEJO en Ateno

TEJO SIN PREZENTAS — tio estis la titolo de la anticipe neanoncita programero de la 61a UK. En la salono Zamenhof de la kongresejo Pantios, dimanĉon, la 1-an de aŭgusto, antaŭ sesdeko da personoj, pluraj funkciuloj de TEJO parolis pri la aktiveco de la junulara sekcio de UEA. En sia malferma paroladeto, la prezidanto de TEJO, s-ino Claude Nourmont-Moon, atentigis pri sia konvinko, ke la ĝenerala esperantistaro ofte scias ne sufiĉe pri la diversflanka kaj utila laboro de TEJO. La nove elektita vicprezidanto, Tibor Vasko, parolis pri la agado inter gejunuloj en kaj el la Tria Mondo; la alia vicprezidanto, Savas Tsiturides, skizis la ĉeftraĵojn de la ĵus pasinta IJK; la ĝenerala sekretario, Brunetto Casini, informis interalie pri la servoj de TEJO; Mirosława Korniluk, nova estraranino, priparolis la turisman aktivecon, kaj Stefan MacGill informis pri la eldonaĵoj de la Organizo akcentante la valoron de la ĝisdatiĝanta revuo *Kontakto*, kiu ne celas nur la junularon kaj sekve meritas pli da ĝenerala interesiĝo kaj subteno.

Multaj demandoj pri la laboro de TEJO, kiuj sekvis la prezenton de ĝiaj aktivecoj, pruvis ke la enprogramigo de ĉi tiu aranĝo estis trafa paŝo. Efektive, tiu ĉi programero kaj la samtage okazinta junulara vespero, en la Studenta domo Zografu, (ĉ. 100 gejunuloj) anstataŭis la tradicion kongresan tagon dediĉitan al la junularo.

"Por ke vi sciu..."

NOVSPECA ARANĜO, kiu jam ĉe sia unua praktika elprovo notis senrezervan aprobon de la kongresanoj, estis la sci-konkurso "Por ke vi sciu ...". La "kvizo" (ni ne hezitu uzi ĉi tiun neologismon) en ĉiuj tri sesioj estis unu el la plej bone vizititaj kongresaj aranĝoj. Tion oni plejparte dankas al la gvidanto de la konkurso, William Auld, kiu plene majstris sian rolon. Kvankam la tuto estis iom haste preparita (oni en la Kongreso mem serĉis partoprenontojn de la konkurso), la sukceso estis plena kaj la venkintoj en la ludo, d-ro C. Minnaja, A. de Giorgi kaj N. Salvesen, meritas des pli grandan admiron, ĉar ili ja ne sciis anticipe, ke ili partoprenos en la konkurso. Sed, se al Auld, kiu animis ne nur ĉi tiun sed ankaŭ plurajn aliajn kongresajn programerojn, ŝuldiĝas la sprita vigleco de la konkurso, al lia konto iru ankaŭ kelkaj tute "monstraj" demandoj, kiujn verŝajne ankaŭ li mem ne estus povinta respondi, se li hazarde troviĝus inter la konkursintoj. La aranĝon sukcesigis, eble eĉ pli ol la kontribuo de Auld, tiu lastatempe spertata, granda preteco de la homoj kunhelpi. Tiel okazis, ke en la konkurso "Por ke vi sciu ..." traparadis tuta aro da konataj movadaj figuroj; krom la venkintoj tie estis ankaŭ: Beaucaire, Benczik, Behrmann, A. Sekelj, Gjivoje, d-ro Francini k.a.

Atenaj malvarmumoj

Probable, pluraj centoj da homoj decidiĝis ne veni al la atena Kongreso pro troa timo de varmego. Tamen, la kongresanoj en Ateno pasigis agrablan someran semajnon dum kiu pro varmego ŝvitis tiuj kiuj restis ĉe siaj hejmoj en Britio, Germanio, Nederlando ... Plia strangaĵo estas, ke pluraj kongresanoj malvarmumiĝis en la kongresejo Pantios, kie la klimatiziloj tro bone kunkciis kaj kelkfoje transformadis la salonojn en iaspecajn friduojn.

Imagitaj floroj

Kiam en la fino de la Teatra Vespero la prezidanto de UEA sursceniĝis por gratuli al la ensemblo de la Bulgara Esperanto-Teatro la sukceson, li petis la aktorinojn akcepti "imagitajn florojn", ĉar la ĝustatempe menditaj kaj eĉ ĝustatempe liveritaj bukedoj estis subite senspure malaperintaj. Montriĝis poste, ke la floroj jam estis en la ŝminkejoj de la aktorinoj, kien ilin sendis — por ke ili ne perdiĝu — bonintenca pordisto.

Ruse aŭ france

Soveta Unio ĉi-jare sendis nur unu reprezentanton al la Kongreso. Eĉ el liaj maloftaj konversacioj eblis konkludi, ke iu interŝanĝis la vojaĝbiletojn de du sovetaj reprezentantoj en du internaciaj kongresoj, ĉar — kiam li ne sukcesis interkompreniĝi kun la kongresanoj en la rusa, li provis atingi tion per la franca.

Kuriero Jackson

Malfacilas trovi alian atenan kongresanon ĉe kiu la laborkvanto tiom malegalis la ŝajnajn fizikajn eblojn. La eta Ian Jackson faris vere gigantan laboron en Ateno. Kvankam la 61a UK verŝajne estis lia unua kongreso (li eble antaŭ kelkaj jaroj partoprenis kongresetojn), dank' al la fakto, ke li unu tutan jaron, kiel ano de la Volontula Servo, asistis al la prezidanto de UEA, Ian memstare kaj solece efektivigis la ideon de sia prezidanto kaj en Ateno eldonis ĉiutagan bultenon sub la nomo "Kongresa Kuriero". Kiam oni venontjare iom prirastos la "Kurieron" kaj el ĝi tiel malaperos eroj kiuj apartenas al la Kongresa Gazetara Servo aŭ eĉ al

periodaĵoj kiel nia revuo (recenzoj pri okazintaj programeroj, serio "Kiel travivi intervjuon"), la populareco de Ian kaj lia "Kuriero" certe multobliĝos, dum ĝia utilo jam nun estas tute evidenta. Efektive, en unu el la kongresaj oficejoj en Ateno la kuriero Jackson senĉese produktadis sian bultenon inter du sandviĉoj aŭ manĝis sian sandviĉon inter du bultenoj. Kaj, ĉion ĉi li faris kun tiu konata brita mieno de kompetenteco, kvazaŭ li venus rekte el Fleet Street.*

* Londona strato en kiu troviĝas la sidejoj de la ĉefaj britaj ĵurnaloj.



Pli ol 2 000 ekskursintoj

LKK atendis grandan interesigon pri la ekskursoj dum kaj post la Kongreso, sed la kongresanoj per sia ekskursemo surprizis eĉ la turisman agentejon, kiu prizorgis la ekskursojn. La urban ekskurson faris 389, la duontagan 336, la tuttagajn ekskursojn 654 kongresanoj (preskaŭ duono el ili elektis la unutagan krosadon), dum al la Postkongreso aliĝis 96 partoprenantoj. Se oni aldonas karavanojn (pola, belga, jugoslava, bulgara), kiuj disponis pri propraj aŭtobusoj, kaj la aŭtomobile venintajn kongresanojn, ne estas troigo aserti, ke la nombro de la ekskursintoj estis duoble pli granda ol la nombro de kongresanoj. Estas interese noti, ke la 96 postkongresintoj por la 3-taga krosado elspezis pli ol 20 000 us. dolarojn (ĉ. 53 000 gld.). **Sur la foto:** La prezidanto de UEA dum la Postkongreso veturas al la supro de la insulo Santorini. La profesia fotisto kaptis la solan momenton dum la kongresa kaj postkongresa semajnoj, kiam la prezidanto ne estis en kunsido, sed en simpla surmula sido.

La nigra libromerkato

Evidentiĝis, ke la kongresanoj dum jaroj tiom kutimiĝis al bazarecaj librobudoj en la kongresejoj mem, ke ili en la 61a UK grandparte ignoris la kongresan librovendejon, kiu situis en la koro de la urbocentro, en la plej prestiĝa librovendejo de la greka ĉefurbo; oni do preferas aĉeti *Parnasan Gvidlibron* prenante ĝin desur renversita margarena skatolo en duonluma angulo de la kongreseja kelo, ol elektante ĝin desur turniĝanta, moderna, cilindroforma librobreto. Sekve, en Ateno neesperantistoj butikumis en la kongresa libroservo (tio cetere estis unu el la celoj), kaj la kongresanoj kontentiĝis per la magra libroelekto, kiun al ili en diversaj anguloj de la akceptejo proponadis Triksini, Gabrielli, Kusurakis, Casini, Tiŝljari, Dragona, Gjivoje, Vasko kaj K-o. Dum la 61a UK floris la nigra libromerkato, kiu estas malbona reklamo ne nur por la aŭtoroj kaj eldonistoj, sed ankaŭ por la tuta Movado.

Moritz kaj la nova statuto

Post dujara laboro kaj kvar antaŭprojektoj aŭ skizoj de la nova Statuto de UEA (kiun la Asocio post kelkaj aldonaj jaroj, pliaj poluroj, projektoj, diskutoj kaj ĝenerala voĉdono verŝajne havos), en Ateno ĉesis funkcii la komitata Komisiono pri la Statuto, kiun gvidis U.J. Moritz. Ankaŭ la kvara statutskizo konservis kelkajn pure "moritz-ajn" terminologiaĵojn kaj difinojn. En la komitat-kunsidoj en Ateno, kie oni aŭdis nur laŭdojn pri la laboro de la Komisiono, gvidata de Moritz, en neformalaj sondaj voĉdonoj montriĝis, ke eĉ Moritz mem ne voĉdonis por siaj propraj proponoj, sed vidinte la reagojn de aliaj komitatanoj — li sin detenis.

Amo kaj interpretado

La lavango de ekskursemuloj plurfoje en la komenco de la kongresa semajno embarasis la organizantojn, ĉar anstataŭ por du, necesis ĉiutage trovi interpretistojn (el la greka, franca aŭ angla) por 4 aŭ 5 aŭtobusoj. Feliĉe, baldaŭ aperis juna usona inĝeniero (kongresa numero 175), kiu pretis ĉiutage dufoje refari la samajn ekskursojn, ne pro tio, ke la angla estis lia patra kaj la franca lia patrina lingvo, sed pro multe pli simpla kialo: li enamiĝis al la greka gvidistino.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 internacia respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

Kontraŭ 5 internaciaj respondkuponoj aĉetintoj de *Leksikono de Oficialaj Vortoj*, kiu enhavas radikojn kaj vortojn rekomenditajn de la Akademio ĝis 1971, ricevos de Edward Ockey, 15 Upper Pines, Banstead, Surrey, SM7 3PU, Anglujo, suplementon, kiu kun la *Leksikono* donas kompletan alfabetan liston de ĉiuj oficialaj vortoj kaj radikoj ĝis 1976, kun la anglalingvaj tradukoj rekomenditaj de la Akademio.

Progresinta studanto de Esperanto dezirus korespondi letere aŭ sonbende kun aliaj esperantistoj: Jorge Valencia, Av. Comandante Espinar 408, Lima 18, Peruo.

Eriko Sunardo kaj Mirjana Simić gedziĝis la 4an de julio en Vieno. Adreso: Melchartgasse 26, A-1130 Wien, Aŭstrio.

Esperantistaj kolektantoj: Senpaga registrado en niaj listoj tutmonde disvastigataj. Detaloj, klarigoj kontraŭ IRK. R. Melo, 34 Av. Russie, F-03 700 Bellerive, Francujo.

Gastfilino/vartistino bezonata por helpi en tri-infana familio. Mi donos poŝmonon kaj libertempon por studi la anglan lingvon. Patrino laboras ankaŭ en la hejmo. Skribu al ges-roj Jakŝiĉ, 16 Bollo Bridge Road, Acton, London W3 8AT.

Esp.-librojn senpagajn vi ricevos kom-pense por tre specialaj tekstoj en via nacia lingvo. Petu detalojn al: Manuel Halvelik, Gebroeders Blommestr. 41, B-2200 Borgerhout, Belgio.

Sune Ahlm translokiĝis al: Nygatan 20A, S-462 00 Vänersborg, Svedujo. Daŭre kolektas kuriozajn ludkartarojn. Interŝanĝe sendas glumarkojn, librojn, ktp.

Poŝtmarkojn argentinajn, rememoraĵojn, neuzitajn, sendas Luis Vicino, Maza 1450, 1240 Buenos Aires, Argentino, kontraŭ sendo de: libroj, revuoj, broŝuroj, kajeroj, bildoj, poŝtkartoj, rilate al: pentroarto, gravuraĵoj, skulptaĵoj, artmuzeoj.

Letervesperon havos E-klubo de Ljungby 2-11-1976. Respondo garantiata. Skribu al: La Guto, Boks 162, S-341 00 Ljungby, Svedio.



Domkonstrua-konstruinspektoro, pentristo, deziras korespondi kun pentrist(in)oj, skulptist(in)oj, surdmutul(in)oj kaj senpatraj gejunuloj, por la lastaj "leterbopatro": S-ro Aulo Minell, Kirkkok. 12, SF-41160 Tikkakoski, Finnlando.

Poŝtkartoj dezirataj por letervespero 25an de novembro 1976. Respondo garantiata. Watford Esperanto-Societo. S-ino I. Sands, 87 Westlea Avenue, Watford, WD2 4NJ Anglujo.

HELPU AL ŜI PERFEKTIĜI EN LA INTERNACIA LINGVO!

Instruistino el Teherano, kiu jam eklernis Esperanton en sia patrolando, ĵus venis al Eŭropo por dum dekmonata restado perfektigi en la Internacia Lingvo. Poste ŝi volus instrui la lingvon en Irano. Ŝi volonte gastus ĉe esperantlingvaj familioj kaj estas preta pagi la kostojn de tia gastigo. Pri pliaj detaloj skribu al la CO de UEA.

TAŬGA LEGOLIBRO

por lernantoj kaj progresintoj aperis: *Forkaptita* de R.L. Stevenson, fama romano pri Skotlando; elangligis Albert Goodheir. "Traduko admirinda" (W. Auld). £2.25, inkluzive sendelspezojn. Eldonejo KARDO, 16 Woodlands Drive, Coatbridge ML5 1LE, Skotlando. Samadrese: Eŭripido, *Bakĥiantinoj* £1.20; Goodheir, *Merlo sur menhiro* (poemaro) £0.85.

Esperanto-dokumentoj

Esperanto-dokumentoj priskribas la laboron, organizon, kulturon kaj historion de la Esperanto-movado. Ili aperas unuavice en Esperanto kaj en la angla lingvo; laŭ la eblecoj aperos poste similaj serioj ankaŭ en aliaj lingvoj. La dokumentoj aperadas neregule kaj estas ekspedataj en faskoj po 3-4 numeroj. Tial la abono ampleksas ne difinitan periodon sed difinitan nombron da dokumentoj: 25,— gld. pagas 10 sinsekvajn dokumentojn en unu serio (Esperanta aŭ angla). Aboneblaj ĉe la landaj kotizperantoj aŭ rekte ĉe UEA. Ĝis nun aperintaj: n-roj 1-4 en la Esperanta serio kaj 1-7 en la angla.

Ĵus aperis

FINANCA EVOLUIGO

Manlibro pri la Financa Programo
de la Esperanto-Movado
de
Humphrey Tonkin

La libreto konsistas el dek ĉapitroj: Enkonduko
— Fontoj — Bezonoj — Impostoj, leĝaro kaj ril-
ataj demandoj — Dokumentado — Formala kaj
neformala organiziĝo de la Financa Programo —
La unua kontakto — Preparo de formala propono
— Enkasigo kaj raportado — Konkludo.


Kvankam la studo celas ĉefe la nove lanĉitan
Financan Programon de la Esperanto-Movado,
ĝi estas ankaŭ aplikebla al aliaj financaj kampan-
joj interne aŭ ekstere de la Esperanto-movado.

Konsilaro pri Esperanto-Agado, n-ro 4.

64p. 21 x 15 cm., broŝ.

Prezo ĉe la Libroservo de UEA: 4,80 gld.

Nun en nova vesto:




ANGLA ANTOLOGIO

1000-1800

Red. Auld kaj Rossetti

319p. broŝurita 13,50 gld.

Granda antologio de granda literaturo



Jam pli ol 1350 personoj posedas la valoran verkon!

En mondo de nestabilaj valoroj, kie kvalito estas
oferata al kvanto, maloftaj estas la aĉetaĵoj, kies
valoro kreskas de jaro al jaro kaj kies apero
videble ŝuldiĝas al grandega homa fortostreĉo.
Sed tia estas la verko "Esperanto en Perspektivo":
monumenta kompendio de la Esperantaj movado
kaj kulturo tra 87-jara ekzistado — kaj, perspek-
tive, en la estontecon. Sur ĝiaj 876 paĝoj troviĝas
praktike ĉiuj scioj, kiujn povas bezoni la uzanto
de la Internacia Lingvo, inkluzive de multaj faktoj
neniam antaŭe publikigitaj.

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo). 876p. 20,5 x 14 cm. 65 ilustraĵoj. 40 indeksopaĝoj.
Prezo: 84,— gld. (por Nederlando 87,36 gld.) plus sendokostoj 10%. Ĉe la Libroservo de UEA.